REGO

 **RUSIA ESPERANTO-GAZETO** 

komuna eldono de REU kaj REJM *№ 3 (5) junio 2001*



en la numero:

omaĝo al S.N.Podkaminer kaj M.F.Paŝĉenko
ĉu vi scias legi en Esperanto?
REJM: ĉu krizo de potenco aŭ krizo de senco?
rakontoj pri la renkontiĝoj en Vladimir kaj Jalta
"Bulteno de REU" kaj "REJM-info"
"Libra revuo" kaj literaturaj paĝoj
interesaj informoj, novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia

Moskvo, 2001

DU EMINENTAJ JUBILEOJ

Plene subtenante la vortojn de O.Kiseljova en REGo № 1(3) pri la graveco memori niajn antaŭulojn, mi deziras atentigi pri ankoraŭ du elstaraj esperantistoj, kiuj naskiĝis antaŭ 100 jaroj, kaj kiujn mi konis persone. Diference de Sergej Rublov, tiuj rimarkindaj homoj estis ne poetoj kaj tradukistoj, sed organizaj aktivuloj. Tamen la fenomeno Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ movado; do tiuj, kiuj metis sian brikon por konstrui la domon de nialanda Esperantujo, same meritas, ke ni ilin ne forgesu.

La unua dankmemora vorto estu pri Semjon Naumoviĉ Podkaminer, kiu dum pluraj jardekoj estis unu el gvidantoj de la E-movado en Leningrado. Lia jubileo pasis ĉi-vintre, kaj estis atende-ble, ke la 20-a REK en Peterburgo enhavos iun programeron omaĝe al li. Sed bedaŭrinde, kaj en la Kongreso, kaj — kiel diris al mi peterburga kolego — eĉ en la urba skalo esperantistoj montriĝis kurt-memoraj...



S.N.Podkaminer naskiĝis 11.02.1901, laŭ profesio estis aviada inĝeniero, kandidato de teknikaj sciencoj, laboris kiel altlerneja docento. Kiel ruĝarmea volontulo li partoprenis en la intercivitana kaj Granda Patria militoj; bone konante la germanan lingvon, li en rango de kolonelo plenumis respondecan laboron en la specifa kampo — reedukado de germanaj militkaptitoj. Postmilite Podkaminer estis rimarkinda preleganto en la Asocio “Znanije” (“Scio”) en Leningrado, membris en Leningrada Packomitato.

Lerninte Esperanton en 1920, la juna Semjon Podkaminer tuj ekagis en la movado. Li aktive partoprenis la faman 3-an Ruslandan Kongreson de Esperantistoj, en kiu estis fondita SEU, poste gvidis ties junularan sekcion, plurfoje elektiĝis kiel membro de Centra Komitato de SEU. En 1926 li estis sekretario de la 6-a SAT-Kongreso en Leningrado. Kiam fine de la 30-aj jaroj la movadon skuis amasaj reprezalioj kontraŭ esperantistoj, li bonŝan-cis eviti areston, sed estis eligita el la partio.

Post la reaktivigo de nialanda E-movado S.N.Podkaminer prezidis Leningradan E-komisionon, multe propagandis kaj instruis la lingvon, partoprenis plurajn gravajn E-aranĝojn en- kaj eksterlande. En 1969 li estis unu el ĉefaj organizantoj de la Postkongreso de UK-54, kiu kunvenigis en Leningrado grandan amason da eksterlandaj kaj sovetiaj esperantistoj. Li multe aktivis en MEM (vicprezidanto en 1972-76), kaj ekde la fondo de ASE en 1979 ĝis sia morto (28.09.1982) Semjon Naumoviĉ estis vicprezidanto de ASE.

S.N.Podkaminer verkis kelkajn eseojn pri Esperanto, kiuj aperis en la libro “Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado” kaj en E-periodaĵoj. Lian grandan aŭtoritaton atestas la titoloj Honora Aktivulo de SEJM (1976) kaj Honora Membro de UEA (1981).

La libro de U.Lins “La danĝera lingvo” mencias Podkaminer kiel anon de speciala brigado, fondita en 1932 ĉe CK SEU por kampanjo pri memkritiko en esperantistaj vicoj. Estas interese, ke al tiu brigado apartenis ankaŭ la alia ĉi-artikola jubileulo — Miĥail Fjodoroviĉ Paŝĉenko.



M.F.Paŝĉenko naskiĝis en novembro 1901. Plurajn jardekojn li laboris en agrikultur-nutraĵa industrio, estis fakulo kun granda praktika sperto kaj emeritiĝis kiel persona pensiulo de landa graveco.

En 1925 Paŝĉenko lernis Esperanton kaj aktive aliĝis al organiza laboro en SEU. Lia ŝatata agadkampo estis starigo de internaciaj kontaktoj, internacia korespondado kaj ĝia utiligo por interesoj de la socio. Estante membro de la lastkonsista CK SEU, li favorsorte transvivis la periodon de reprezalioj — por daŭrigi la aktivadon jam en la novaj etapoj.

En 1956 okazis la legenda provo restarigi SEU, kiun iniciatis kaj faris M.F.Paŝĉenko kaj kelkaj aliaj restintaj membroj de CK. Oni informiĝis, ke formale SEU ne estis likvidita, kaj kunvokis restarigan kunvenon. Miĥail Fjodoroviĉ kaj liaj kunuloj frontis kaj solvis plurajn organizajn demandojn: kunvenejo, renovigo de la sigelo, informado pri la aranĝo, sed forgesis interkonsentigi la aferon kun partiaj instancoj — kaj la kuraĝa iniciato estis pereigita...

Post la fondo de la E-Komisiono ĉe SSOD M.F.Paŝĉenko estis ĝia membro; kiam oficialaj instancoj decidis fondi ASE, li eniris la Organizan Komitaton kaj aktive partoprenis ĝiajn kunsidojn. En 1979-82 li estis estrarano de ASE, kaj en 1982-89 — membro de ties Prezidio. En tiuj jaroj, malgraŭ la aĝo, la veterano vizitadis ankaŭ kunvenojn de Moskva E-klubo.

Kiam en 1989 estis restarigita SEU, Miĥail Fjodoroviĉ Paŝĉenko (kune kun alia tiam vivanta membro de CK SEU, odesano A.I.Verŝinin) estis elektita kiel Honora Membro de SEU. En 1990 li vizitis la 9-an Kongreson de SEU kaj verve rakontis al la kongresanoj pri sia multjara sperto.


En januaro 1994 M.F.Paŝĉenko forpasis. Monaton antaŭ tio mi vizitis lin, vivintan tute sola: la edzino mortis pli frue, la idaro loĝis aparte. Jam sentante la malfortiĝon, Miĥail Fjodoroviĉ ne volis cedi: surtabligante teon, li ĉion faris mem kaj kategorie kontraŭis, kiam mi proponis helpi. Necesas diri, ke li invitis min (tiam vicprezidanton de REU) por grava celo: donaci al la kaso de REU konsiderindan monsumon, ŝparitan el la pensio. Tiu nobla ago inde kronis lian longan vivon.

Ambaŭ memorinduloj — laŭ io tre diversaj, laŭ alio similaj — apartenis al tiu movada generacio, kiu, maturiĝinte en la antaŭmilita SEU, portis sur siaj ŝultroj la malfacilan taskon de reaktivigo de nialanda movado post la du jardekoj da anabiozo. Tiuj homoj kun juneca entuziasmo laboregis, transdonante sian sperton al novaj generacioj, kaj nia devo estas — firme pluteni la rebruligitan de ili torĉon.

Viktor Aroloviĉ (Moskvo)

maltaŭgaj pensoj: Ĉu vi scias legi en Esperanto?

Lastatempe ni pli kaj pli ne komprenas Esperanton. Ni eĉ komencis legi periodaĵojn por almenaŭ iom plibonigi niajn lingvoposedojn. Sed la legado nur pli malfaciligis la situacion. Por almenaŭ iom savi nin, ni eĉ ekinteresiĝis pri la Fundamento de Esperanto. Ne helpis. Kaj finfine ni faris la lastan paŝon – ni rigardis vortaron. La PIV-on. Eĉ PIV ne helpis. Verŝajne tio jam estas diagnozo: ni ne konas la alfabeton de Esperanto. Tamen io flustras al ni, ke ne ĉio glatas en tia teorio. Io flustras, ke ne ni kulpas. Io flustre, sed firme konsilas al ni: kontrolu, ĉu ekzistas kontraŭ-Esperanta komploto. Kiu komplotas? Ni ne scias. Ĉu idistoj, ĉu volapukistoj, ĉu idiom-neŭtralistoj, ĉu pazigrafiistoj aŭ iuj aliaj? Ni ne scias, sed io, certe, estas. Ekzemple rigardu la lastan (5/2001) numeron de "La Ondo de Esperanto", la trian paĝon. Ĉu vi komprenas pri kio ni atentigas? Jen ankaŭ vi vidas, ke oni komplotas. Ni tion tuj komprenis kiam tralegis la artikolon "Ĉu ni bezonas la Akademion?". En la artikolo iu Рэнато Цорсэтти rakontas pri la Akademio de Esperanto. Kaj tiu kaŝita antiesperantisto sentime malkovras nomojn de la aliaj kunkomplotantoj: Мигуель Гутиеррез-Адуриз, Йорге Цамацхо, Хумпхрэ[?] Тонкин, Бертил [ŝajne, В-]эннэргрэн kaj multaj aliaj. Inter ili estas du personoj, kies prapatro estis prikantita en la Mahabarato. Inter la "fiakademianoj" estas eĉ nia eksa samlandano Boris Kolker. Estimata sinjoro Kolker, ne permesu vin trompi! Lasu tiun aĉan Akademion, en kiu anoj eĉ ne konas la alfabeton de Esperanto. Ja ni scias, ke vi konas ĝin, ni vidis viajn instruilojn, kompilitajn dum vi loĝis en Ufa. Aŭ ĉu ankaŭ vi jam komplotas?



Ĉu restas ie krom ni esperantistoj, fidelaj al la Unua Libro? Geamikoj! La friponoj, la idistoj-volapukistoj ne venkos. Ni ne uzu la aĉajn kromesperantajn literojn! Ni savu nian lingvon, kaj forbalau la kotaĵon ekster nian domon!

Ĉu vi povas imagi kiom arogas tiuj fi-lologoj? Jen kion ni tralegis en "Sub stelo rigida", versokolekto tradukita de Baldur Ragnarsson kaj eldonita en la fama serio "Stafeto": "La islandaj literoj **Þ** kaj **Ð/ð** havas proksimume la samajn sonojn kiel **th** en la angla **think** kaj **there** respektive; presejoj, kiuj ne disponas tiujn tipojn, ordinare anstataŭigas ilin per **Th/th**." Huraaaa! Oni permesas al ni ne lerni islandan lingvon kaj anstataŭigi ĝin nur per la angla! Dankon (kun profunda sinklino)! Estimataj akademianoj, kiun lingvon ni devas lerni por kompreni ankaŭ kiel legi la nomojn Sabira Ståhlberg (ĉu la svedan?), Yamasaki Seikô (ĉu la

japanan?), Flóra Szabó-Felső (ĉu la hungaran?), Aini Vääräniemi (ĉu la finnan?), ktp? Ni ĝojas, ke almenaŭ por kompreni la nomon de nia samnomulo L.Zamenhof ni bezonas nur Esperanton. Sed ĉu ni plu bezonus Esperanton, se ni ellernus ĉiujn aliajn lingvojn? Evidente ne.

Sed ni posedas nur Esperanton (iam ellerninte ĝin) kaj la rusan (denaske). Interalie, en la rusa oni komence skribas la rusan skribon de nomo kaj nur poste, en krampoj, aldonas koncernan nacian varianton. Ekz. Вильям Шекспир (William Shakespeare), Жан-Батист Мольер (Jean-Batiste de Molière). Sed verŝajne rusoj pli estimas sian lingvon kaj legantojn. Ve, pri esperantistoj ni ne povas konstati la samon. Ni ne kredas, ke William Auld (evidente, necesas prononci Виллиам Аульд) estimas nin, vin, viajn E-amikojn kaj eĉ la lingvon mem. Kaj por pruvi ĉi tiun opinion ni donas al vi plian fakton: ĉi tiu ŝajne- Виллиам Аульд (William Auld) donacis sian bibliotekon al la Nacia Biblioteko de Skotlando (Edinburgo). Do, ĉio estas klara: ĉiu vizitanto de la biblioteko povas senprobleme en klara kaj kara angla lingvo legi sur la librokovriloj "William Auld" kaj neniu demandos, kiu li estas, ĉar estas klare presite "William Auld". Kaj ĉiuj tuj komprenos, ke li estas elstara skota verkisto (ial verkanta ankaŭ en Esperanto). Imagu, kia malglataĵo povus okazi, se estus skribite "Viljam Old": neniu komprenas pri kiu oni skribas, tuj aperus malfacilaj demandoj pri tiu persono, pri la lingvo, ktp. Certe estas pli facile uzi la anglan.



Estimataj samideanoj, gardu nian karan lingvon, ja ĝi estas bela, klara kaj bona. Ne kredu al tiuj, kiuj parolas pri malpotenco de Esperanto. Ne kredu al tiuj, kiuj opinias, ke iliajn nomojn ne eblas transskribi en Esperanto. Ne permesu al malkleraj, sed tro sin-amantaj personoj malpurigi nian lingvon.

Estimataj redaktoroj (ni parolas ne nur pri s-ro Корженков el "La Ondo de Esperanto") provu almenaŭ formale estimi Esperanton, ĉar vi malkredigas legantojn pri potenco de la lingvo kiun vi elektis por redakti.

Altestimataj Akademianoj, ni ne kredas, ke kiam vi komencis lerni Esperanton, viaj instruistoj ne rakontis al vi pri la alfabeto de Esperanto. Provu rememori ĝin.

Kaj ĉiuj esperantistoj, ne forgesu, ke vi estas adeptoj de la lingvo, kiu jam havas sian riĉan historion kaj kulturon. Ne provu ŝanĝi lingvon, kiun kreis ne vi, kaj kiun bonuzas multaj personoj sen via enŝoviĝo. Ne vi estas la unuaj kaj ne vi estas la lastaj. Ni volas, ke niaj infanoj komprenu nin kaj librojn, kiuj estas en niaj hejmaj bibliotekoj, uzante nur 28 zamenhofajn literojn.

Ĉiam estimantaj vin Ludovikoj Lazaroj Zamenhofoj <zamenhofoj@mail.ru>

REJM. Ĉu krizo de potenco aŭ krizo de senco?



Jurij Karcev (Uljanovsk)

Observante la agadon de SEJM-REJM (kaj estinte eĉ iom engaĝita en la aferojn), mi devas konstati, ke dum lastaj jaroj ĝi iĝas pli kaj pli karikatura. Kio do okazas? Ĉu malrespondeco estas ĝenerala trajto de la nuna junularo aŭ tio estas problemoj de apartaj personoj? Rigardu ni malantaŭen…

* * *

Historio ripetiĝas dufoje:
komence kiel tragedio, poste kiel farso.

SEJM-1 estis fondita en kondiĉoj de kontraŭstareco. Eble pro tio ĝi estis unu el la plej sukcesaj E-organizoj en la lando. Estis unu komuna malamiko – burokrata sistemo, – kaj ĉiuj fortoj estis dediĉitaj al batalo kontraŭ ĝi. Estis ideoj, estis teamo, kiu efike kunlaboris. La rezulton vi scias. Estis okazigita konkurado inter kluboj, kiu spronis evoluon de la movado. Famaj SEJToj ĝis nun admirigas multajn. Kio sekvis poste?

La epigrafa citaĵo povas esti ĝeneraligita jene. Foje okazas eventoj vere historiaj, kun multo da energio, homa aktiveco ktp. Ne nepre negativaj, povas esti ankaŭ pozitivaj. Sed kiam oni provas mekanike ripeti la praktikon, "monto naskas muson".

Ekzemploj en la vivo multas, mi ne disipos la lokon. Mi nur menciu konstantajn daŭrigojn de sukcesaj kinofilmoj kaj libroj. Se tie ne aperas novaj ideoj, sed oni nur remaĉas malnovajn modelojn, tiuj daŭrigoj kutime estas malsukcesaj. Kaj jen ankoraŭ unu ilustraĵo – t.n. kargo-kulto.

Dum la dua mondmilito, kiam la bataloj okazis ankaŭ en Oceanio, unu el la insuloj estis uzita de usonaj taĉmentoj por prepari atakon. La indiĝenoj vidis, ke al la insulo konstante venadas novaj homoj – blankaj kaj nigraj. Sed ili ne vidis, ke tiuj laborus – nek kreskigus batatojn, nek plektus matojn. Tamen la venintoj havis amason da aĵoj: bongustajn manĝaĵojn kaj firmajn ŝuojn, ĥaki-vestojn kaj miraklajn armilojn. Kiamaniere ili akiras tiujn bonaĵojn, se tute ne laboras?

La atentaj insulanoj rimarkis, ke tion oni veturigas al la usonanoj per aviadiloj aŭ ŝipoj. Sed kial nur al tiuj, sed ne al polinezianoj? Meditoj de la fondontoj de la kargo-kulto naskis sekvan konkludon: la fremduloj scias iajn magiajn ritojn, per kiuj scipovas devigi diojn sendi al ili amason da bonaj aĵoj. Do la homoj ekis atente observi agojn de la usonanoj.

Rezulte post iom da tempo la kargo-kulto aspektis jene. La insulanoj forhakas strion en arbaro (kvazaŭ flugokampo) aŭ kunmetas trabojn surborde (kajo). Apude ili starigas dometon kun longa bambua bastono (radiomasto). La "pastro" de la kargo-kulto per lianoj suroreligas du pecojn de arba ŝelo (aŭdiloj) kaj ion krias al la tria (mikrofono). Kaj atendas, kiam el la foro venos ŝipo aŭ avio por provizi ĉiujn adeptojn per la sankta "kargo"…

Ridinde? Tamen ankaŭ nun kaj ĉi tie multaj ripetas la samajn erarojn. Ili opinias, ke sufiĉas imiti la mekanismojn kaj ĉio ripetiĝos same. Sufiĉas elekti komitaton, kaj la prikomitatita problemo solviĝos.

Sed ni revenu al niaj herooj. Jam SEJM-2 estis iusence nur kopio de iama SEJM. Jam nure pro sia nomo. Kial oni ne donis al la organizo novan nomon, sed uzis jam ekzistintan? Por daŭrigi tradiciojn? Por uzi la gloron de la pasinto? SEJM funkciis bone, do ni prenu la nomon, kaj tio helpos? Certe estis novaj freŝaj ideoj, estis sukcesa agado, sed mi ne povas liberiĝi de la sento, ke tio estis nur ripeto, ke la ĉefa SEJM restis en pasinto.

Tamen mi ne nomu SEJM-2 malsukcesa. Estis ripeto, sed sufiĉe interesa (ĝis certa tempo). Poste venis alia fazo. La dua uzo de la sama infuzaĵo ofte estas trinkebla, sed kion diri pri la tria?..

* * *

– Nunaj novjar-amuziloj estas malpli bonaj ol antaŭe.
– Kial?
– Mi hieraŭ aĉetis kelkajn, pendigis – ili ne amuzas!

REJM ion volas, sed ĝi ne scias, kion. Ĝi aŭdis, ke la etoso en iamaj OkSEJT-oj estis gaja, kaj volas, ke tio ripetiĝu. Sed ĝi ne scias, kion fari por tio, kaj ĵetas sin el unu ekstremo al la alia.

Jen aperis ideo okazigi tendan OkSEJT-on, jen oni decidas favore al pli luksa, kvankam multekosta bazejo. Jen oni suferas pro manko de seriozeco, jen oni rezignas seriozan temon, ĉar tio forpuŝos multajn partoprenontojn. Kaj jen estas proponita retro-SEJT, ĉar oni plendas, ke mankas tradiciaj programeroj kaj pro tio la tendaro iĝis alia.

Mi ne povas ne tuŝi la temon pri la ĉi-jara OkSEJT, ne nur pro personaj kaŭzoj, sed ankaŭ pro tio, ke ĝi bone montras la nunan staton de REJM.

Kiam oni donis al ni la rajton okazigi la tendaron, la entuziasmo de niaj klubanoj estis granda, jam en la trajno al Uljanovsk ni provis formuli la koncepton kaj principojn de la estonta tendaro. Post la reveno kelkaj tagoj estis dediĉitaj al vagado tra ĉirkaŭaĵoj de Uljanovsk kaj serĉo de taŭga bazejo. Sed poste komenciĝis malagrablaĵoj.

La 1-an de oktobro 2000 en Niĵnij Novgorod ni prezentis la koncepton kaj la elektitan bazejon al REJM-komitato kaj ricevis principan konsenton kaj aprobon. Sed kiam ni komencis reklami la aranĝon kaj pretigi oficialan kontrakton, evidentiĝis, ke la komitato ankoraŭ ne voĉdonis oficiale kaj tiuj decidoj ne estis validaj. Nur fine de la oktobro ni ricevis tiun oficialan decidon. Ĉu ni povis esti certaj ke la decido estas definitiva? Tiutempe neniu dubis…

> Iu junulo decidis edziĝi. Li rakontis tion al sia panjo:
> – Panjo, mi decidis fari surprizon por vi. Mi venigos en nian hejmon samtempe tri knabinojn, kaj vi provu konjekti, kiu el ili estas mia fianĉino.
> Sekvavespere li efektive venas kun tri knabinoj: blondulino, brunulino kaj rufulino. La vespero pasis bonege, ĉiuj restis kontentaj. Kiam la gastinoj foriris, la junulo demandas la panjon:
> – Panjo, do kiel vi pensas, kiu estas mia fianĉino?
> – Sendube, la rufulino!! – diras la panjo.
> – Patrinjeto! – la filo ekridetis, – sed kiel vi povis tuj trafe konjekti?
> – Mi de la komenco ne ŝatis ŝin...
> *(esperanto-anekdot)*

Poste komenciĝis bremsaĵoj pri la financa direktoro de la tendaro. Estis proponita Garik, sed la komitatanoj ne konsentis. "Li tro premas", diris ili. Rezultiĝis stranga situacio. REJM-komitato nek permesis al ni elekti respondeculon pri la financoj, nek proponis iun mem. En tiu stato la situacio restis eĉ ĝis REK-EoLA en marto, kiam finfine estis elektita la financa direktoro.

Preskaŭ samtempe aperis hezitoj pri la loko. Mi ne rakontu ĉiujn peripetiojn, nur diru, ke konstante aperadis iuj strangaj "oni". Kelkaj homoj venadis kaj raportis, ke jen oni diras, ke ekzistas pli luksa bazejo apud Dimitrovgrad (kaj poste evidentiĝis, ke tie la bazejestroj permesas nek loĝi surplanke nek starigi tendojn). Jen oni diras, ke ekzistas alia bazejo, surborde de Volga (sed ĝi riskis tute ne malfermiĝi ĉi-somere).

Kaj poste, kiel logika kompletigo, aperis duboj ankaŭ pri la temo. "Esperanto-historio" ŝajnis tro serioza por la ĉefa tendaro de la jaro.

Mi tiel detale priskribas la situacion, por montri ke REJM ne havas iun klaran agadmanieron kaj troviĝas en stato de konstanta necertemo. Ŝanĝiĝas prezidantoj, ŝanĝiĝas komitato

– sed la spirito restas la sama. Po-aparte simpatiaj homoj, kiam ili amasiĝas al REJM-komitato – okazas io nekomprenebla…

* * *

Reĝon kreas ties eskorto.

Kio do pri la titola demando?

Mi donus jenan respondon. Mankas juna gvidoro (kun nepra kerna teamo apud si), kiu kapablus doni fortan puŝon al la movado. Ne kopiante tion, kio estis, sed proponante iun novan koncepton de la evoluo. Dum tia gvidoro ne aperos, REJM kiel organizo plu restos en la sama stato.

Ambaŭ tiuj kondiĉoj estas nepraj – kaj la gvidoro, kaj la teamo. Kial gvidoro? Ĉar devas esti homo, kiu flamigos la aliajn, kiu kolektos apud si teamon kaj kunordigos ĝin. Kial teamo? Ĉar nepre bezonatas forte ligita kompanio, kiu akceptos tiun kunordigon ne kiel premon, al kiu necesas rezisti, sed kiel amikan kunlaboron. Kiu helpos al sia gvidoro anstataŭ pridiskuti la problemon. Kiu elspezos komunan energion por la komuna agado. Sed la nunaj gvidorganoj estas nur imitaĵo de la sukcesa mekanismo, kvazaŭ bambua radiomasto.

Kelkaj asertas, ke dekomence necesas havi celon, kaj tiam aperos gvidoroj. Laŭ mi, tio ne tute taŭgas. La ĝenerala celo – evoluigi E-movadon – estas memkomprenebla, sed povas esti diversaj strategioj de la agado. Kion elekti, al kiu direkto evoluigi – dependas de la gvidoro. Unu decidos okazigi konkuradon inter kluboj, kaj la movado por tiu tempo estos kolorigita tiel. Alia prenos ideon de interna memperfektiĝo. Tria preferos poreksteran agadon, ktp. Sed ne eblas komune decidi pri la maniero, kaj poste komisii al la gvidoro realigi tion. Gvidoroj ne ŝatas realigi deflankajn ideojn. (Eble ĝuste pro tio ili estas gvidoroj?)

Kaj restas nur lasta demando. Ĉu la nuna junularo malbonŝancis, ke ĝi ne havas adekvatan organizon? Nu, ne tiom. Feliĉe, en la lando jam estas aliaj funkciantaj E-organizoj, kaj ĉiu deziranto, kiu sentas sin sufiĉe matura por labori, povas realigi siajn kapablojn.

E-novaĵoj el Namereĵnije Ĉelni

La 22-an de majo 7 membroj de la E-klubo "Salamandro" veturis al malgranda, sed fama proksima urbo Jelabuga. Por kio?

Antaŭ nelonge al Oleg Demjaŝev venis la ideo organizi zorgadon pri la situanta en Jelabuga tombejo de japanaj militkaptitoj. La ideo estis akceptita, kaj baldaŭ ni rete informis pri tiu deziro japanajn gesamideanojn el JEI (Japana E-Instituto) kaj JEJ (Japana E-Junularo) por ke ili trovu geparencojn de la entombigitoj kaj ricevu ilian konsenton por nia laboro. Oni ekinteresiĝis pri la afero, kaj al ni venis propono fari retpaĝon pri tiu ĉi temo kaj peto pri plia informo. Post tio Oleg Demjaŝev kaj Alsu Miftaĥova veturis al Jelabuga Ŝtata Histori-Arkitektura kaj Arta Muzeo-rezervejo. Tie ili eksciis pli detale la historion de militkaptitoj en Jelabuga kaj ricevis kopiojn de desegnaĵoj faritaj de japana pentristo en koncentrejo. Ĉio ĉi kune kun kurta raporto pri historio kaj agado de la klubo estis sendita al Japanio.


Ĉi-foje ni veturis al Jelabuga por fari fotojn de la loko mem. Ĝi aspektas bele kaj lirike. Estis suna mateno, kantis birdoj. Tie restis nur monumento kun hieroglifoj kaj surskriboj en la rusa. Ĉirkaŭ ĝi kreskas pinoj kaj betuloj, en kies ombro kreskas konvaloj. Ĉio estas barita per ŝtona barilo. Kaj la loko nun havas nomon de sakrala parko "Papilio sur manplato".

Apud ĝi situas la tombejo de militkaptitaj germanoj. Ni faris ankaŭ kelkajn fotojn de tiu kaj decidis turni nin al Germanio kun la sama propono, kiel al Japanio.

La dua afero: la klubo "Salamandro" partoprenis eksterkonkurse en festivalo de profesiaj lernejoj "Studenta Printempo". De ni estis prezentitaj E-lingvaj kantoj kaj teatraj miniaturoj en la rusa. Spektantoj reagis aplaŭde kaj ride. ***(E-klubo "Salamandro")***

Laŭ afabla permeso de la Redaktoro, mi luas unu paĝon de REGo. Mi volas uzi ĝin por paroli pri vivo, ĉu pri esperanta vivo, ĉu pri eksteresperanta vivo…Do, bonvenon al la paĝo!

Strutismo



Mi tre ne ŝatas, kiam oni diras: “Jen, s-ro ABCĈDEF lasis E-on, ĉar li ne partoprenas jam la duan tendaron.” Aŭ, kiam la samaj oni diras: “Jen, s-ro ABCĈDEF post du jaroj revenis al E-o.” Mi tre ne ŝatas la eldirojn, ĉar plej ofte tion voĉigas “ŝaŭmaj” aktivuloj, aktivuloj, kiuj opinias sin aktivaj nur pro ofta partopreno en E-aranĝoj.

Kio estas E-aktiveco? Kio estas E-aktivulo? Mi provu iom rezoni pri la demandoj uzante famajn ekzemplojn.

Dum pli ol 10 jaroj aranĝojn partoprenas A.Ĥrustaljov. Lia ĉeesto ĉiam malenuigas aranĝojn, dank’ al lia ĉarma kantado mi povas nomi lin la “reĝo de nokto”. Malfacilas nomi homon, kiu kapablus krei pli kortuŝan, pli intiman etoson. Sed ĉu tio sufiĉas por esti nomata E-aktivulo? Antaŭ kelkaj jaroj li lanĉis E-kurson en Dimitrovgrad kaj ĉi-jare eĉ organizas LETon. Jen li vere ekaktiviĝis. Ankoraŭ unu ekzemplo: V.Melnikov. Homo, kies partoprenon en tendaroj ne ĉiam eblas rimarki, samtempe li estas fama literaturisto, lia interret-klubo “Kreado” estas verŝajne la plej bona pri-E-literaturaĵo en Esper-reto. Certe li estas aktivulo. Jen ankoraŭ ekzemplo: A.Blinov. Iam li el-donis bonegan E-informilon “Jene” (inda heredanto de “Eksciu, ke…”), aktive partoprenis en SEJM-2, famiĝis en TEJO, sed tute neatendite li mallanĉis “Jene” kaj preskaŭ lasis landskalan aktivadon. Ĉu li kabeis? Tute ne. Li ekzorgis pri la ĉeboksara klubo. Hodiaŭ mi povas konkludi, ke li estis prava kaj JEAĈR estas, verŝajne la plej laŭdinda lia kreaĵo. Ankoraŭ ekzemplo. En Novosibirsk loĝas esperantisto S.Pokrovskij. Klubon li ne gvidas, tendarojn ne partoprenas kaj eĉ vizaĝe li preskaŭ ne estas konata. Ĉu ne tio estas ekzemplo de perdita esperantisto? Tute male: li tradukas, verkas vortarojn, kontribuas al LOdE kaj finfine li estas ano de la Akademio de Esperanto. Certe li estas aktivulo.

Do, kio estas aktiveco? Verŝajne tio estas aktiva laboro por E-movado. Kio estas E-movado? Verŝajne tio estas socia unuiĝo de esperantistoj. Kio estas esperantisto? Esperantisto estas ajna persono uzanta E-on.

Ĝis lasta frazo ĉio estis klara, sed post ĝi ĉio nebuliĝis.

Dum lastaj jaroj (laŭ mi ekde 1992) pli kaj pli grandan parton de OkSEJToj prizorgas homoj, kiuj apenaŭ parolas Esperante. Ili estas aktivuloj, sed ne estas esperantistoj.

Esperantisto, aktivulo, spertulo… Laŭ mi ĉiuj ĉi vortoj estas nur ŝildoj, kiujn ni pendigas sur ĉies bruston aŭ kolon, por plu ne pensi. Tio estas facila rimedo por eviti niajn problemojn.

Mi tre ne ŝatas homojn, kiuj ĉiam scias kiun ŝildon uzi… Ili por mi similas struton, kiu kaŝas la kapon en sablon anstataŭ pripensi danĝeron. Ankaŭ mi estas strutisto-ŝildisto. Ankaŭ mi ne plaĉas al mi. Verŝajne ankaŭ mi estas ŝaŭma esperantisto.

Respondeca Loĝejluanto

> En Pariza trinkejo sidas viro antaŭ grandega vinbotelo. Alia gasto alparolas lin:
> – Ĉu vi ne scias ke ĉiujare 50.000 francoj mortas pro alkoholo?
> Spite al tio la viro prenas grandegan gluton kaj diras:
> – Mi estas svedo.
> *(esperanto-anekdot)*



Antikvaj civilizoj: Oriento

Ekde la 29-a de aprilo ĝis la 2-a de majo en la urbo Vladimir pasis Esperanta renkontiĝo. Partoprenantoj venis el Moskvo, Ivanovo, Vladimir, Ĉeboksari kaj aliaj urboj. Organizis tiun renkontiĝon la teamo IGRA (Iniciata Grupo de Rusiaj Aktivuloj). Sube vi trovos la impresojn pri ĝi.

* * *

Vidpunkto de la organizanto.

Ĉirkaŭ la 20-a de marto. Mi sidas hejme ĉe Dima Oŝĉepkov kaj ni plendas unu al la alia, ke ĉirkaŭ la 1-a de majo estos kelkaj liberaj tagoj, kaj estas deziro ien veturi. Sed Volgograd, kie devus okazi VER (kiu, ŝajne, ne okazis), kaj des pli Krimeo kun "Aroma Jalto" estas sufiĉe for – duonon de la festoj okupus nur la vojo.

Ĉu estos io pli proksima? Ne. Eble ni mem faru por ni ion ekster Moskvo? Kial ne?

Post ioma pririgardo de eblaj lokoj (inter kiuj estis ankaŭ Apudmoskvo, Jaroslavl, Ivanova reg.), estis elektita bela antikva (kaj proksima al Moskvo) urbo Vladimir. Paralele estis pripensataj koncepto kaj programo de la renkontiĝo – ni volis fari ne simplan ripozon, sed ion interesan kaj utilan.



Ĉio tiel rapide ekmoviĝis, ke post semajno oni jam telefonis al mi el Ĉeboksari kaj demandis, ĉu ĉiuj rajtas partopreni la renkontiĝon, ĉu ne estas ĝi, hazarde, fermita: oni ne povis kredi, ke pasis nur semajno post la apero de la unua penso. Fine de marto aperis la unua informilo...

La temo, kiun ni elektis por la renkontiĝo, estis "Antikvaj civilizoj: Oriento". Ni volis ekscii pli ne nur teorie, sed ankaŭ praktike pri kelkaj orientaj landoj: Japanio, Ĉinio, Nepalo...

La 28-an de aprilo en la Bazejon de Junaj Turistoj venis deko da esperantistoj: la organizantoj de la renkontiĝo kaj REJM-aktivuloj (kiuj devis paroli pri OkSEJT).

Kiam sekvatage komencis venadi la unuaj partoprenantoj, la domo jam estis dekorita kaj aranĝita orient-stile. Sur muroj oni vidis diversajn skribaĵojn: hieroglifojn kaj Esperante skribitajn eldirojn de saĝuloj; pendis ordinaraj kaj tubaj sonoriloj.

Estis sufiĉe facile teni la tagordon: ĉio estis bone preparita antaŭe de la organiza teamo, kiu konsistis el Dima Oŝĉepkov kaj mi – ambaŭ el Moskvo, kaj programa grupo: Saŝa kaj Olja Fedotova-j, Olesja Oŝĉepkova (la fratino de Dima) – ĉiuj el Ĉeboksari, Sonjo Ŝejnina – Ivanovo.

Persone al mi la renkontiĝo tre plaĉis. Aparte plaĉis prepari ĝin. Kaj poste atenti, ke ĉio pasu dum la aranĝo bone. Ĉu vere ĉio pasis bone? Demandu la partoprenintojn (da kiuj estis pli ol 60), kaj ili rakontos al vi.

Krom la fotoj ĉi tie, vi povas vidi pli ol 130 fotojn de 7 fotistoj pri la aranĝo en Interreto

laŭ la adreso <www.esperanto.nm.ru>.

Baldaŭ en la reto estos ankaŭ la hejmpaĝo de IGRA, kaj tie – la paĝoj pri la renkontiĝo kun la fotoj, la informoj pri ĝi, adresoj de la partoprenintoj kun la divido laŭ grupoj...

Amike via, Oĉjo Dadaev

* * *

P.S. Re al antikvaj civilizoj.

Certe, antaŭe mi aŭdis pri ĝi, ion legis. Kaj nun ni renkontiĝis kun ĝi preskaŭ “persone”. Kaj mi estis ne sola kaj ĉiujn ĝi fascinis.

Tiu fora kaj tial iom mistera Oriento vere impresis. Ĉu per siaj beleco kaj modereco, ĉu per neordinareco de la tradicioj kaj la kulturo? Mi tiom alkutimiĝis al ĝi, ke malfacile estis revenanta al “neorienta vivo”.

Ĉu vi hazarde ne volis kapoklini, kunmetinte la manojn responde al ies saluto? Ĉu vi jam trinkas verdan teon, kvankam antaŭe tute malŝatis ĝin, kaj mankas al vi bastonetoj, kiam vi manĝas rizon? – ankaŭ al mi.

Antaŭ kelkaj tagoj mi, forlasante nian vladimiran Japan-Ĉinion, deziris paki en la dorsosakon ne nur la aĵojn, sed ankaŭ miajn pensojn, sentojn; mi volis forgesi nenion el la maro de miaj impresoj, ĉar ĉiu el ili meritas “la plej valoran oceanan perlon”. (Estas interese, de kie mi prenis tiun aĵurecan frazon?)

Rememorante ĉion ekde la komenca tago mi penas kunmeti el helaj kvadratetoj de miaj emocioj kompletan bildon – tuj ne rezultiĝas: se vi almenaŭ foje mozaikumis, vi scias, ke dekomence simple estas bunto antaŭ la okuloj, kaj vi ne scias, de kio komenci. Ĉio tiel orientece (aŭ rusece) koloras kaj plenplenas de lumo, varmo kaj ĝojo, ke vi ne volas ion apartigi, sed simple kolekti tiun aron kaj admiri ĝin kaj donaci al tiuj, kiuj ne sukcesis veni. Vidu tio similas al loterio, kie ĉiu bileto estos gajna. Elektu ajnan!

Antaŭe mi neniam imagis, ke scipovas pentri. Evidentiĝis, ke tio estas bonega! Mi ne verkas versojn, sed mi scipovas hajkojn...

Olesja Oŝĉepkova (elrusigis O.Dadaev)

* * *

Mi estas jam longjara e-istino, iam mi partoprenis en kelkaj E-renkontiĝoj, sed tiel okazis, ke dum longa tempo mi ne havis tiun eblon. Kaj jen okazis preskaŭ nekredebla miraklo – E-renkontiĝo en Vladimir. Certe mi ne preterlasis tiun raran (por mi) eblecon kaj volas iomete rakonti pri miaj impresoj.

La renkontiĝo postlasis en mia memoro neforgeseblajn impresojn, precipe pro temaj programeroj. Mi lernis ludi goon, provis (verdire ne tre sukcese) fari kaj pentri drakojn, fari origamiaĵojn, ellernis (post pena trejnado) uzi ĉinajn bastonetojn por manĝi rizon dum ĉina vespermanĝo, partoprenis kun plezuro en tea ceremonio, eksciis multon interesan pri kulturo de antikvaj civilizacioj. Kaj ĉio ĉi fakte dum tri tagoj. Tre memorindaj estis (krom la menciitaj programeroj) marŝado al Ora Pordego kaj flugigo de kajtoj tie, rakonto pri Japanio, tre interesa “Konkurso de altranguloj”.

Mi ne mencias multajn aliajn programerojn, ĉar pro tio, ke mi loĝis ne en la turistejo

kun ĉiuj, sed en la studenta komunloĝejo (kie min gastigis mia iama lernantino, ankaŭ partopreninta la renkontiĝon), mi ne povis partopreni en noktaj programeroj, bedaŭrinde.

Ankaŭ estas menciinde, ke kvankam dum la E-renkontiĝo ne okazis primovadaj programeroj, ĉeestantaj en ĝi vladimiranoj (bedaŭrinde nemultnombraj) havis seriozan konversacion pri renaskiĝo de E-movado en nia regiono.

Kaj fine mi volas tre danki ĉiujn organizantojn de la renkontiĝo pro ĝia okazigo en nia antikva urbo. Mi tre esperas, ke eventuala estonta E-renkontiĝo (iam eble organizota en Vladimir aŭ en la regiono – ĝi havas multajn belajn vidindajn lokojn) estos preparata fare de esperantistoj de nia regiono.

Ljubovj Isajeva (Muromcevo, Vladimira reg.)

* * *

Tiu ĉi renkontiĝo signifis por mi tre multe. Unue, ĝi okazis en mia urbo – Vladimir, kio estis grava kaj oportuna por lokaj esperantistoj. Bedaŭrinde ne ĉiuj ili povis partopreni (pro diversaj kialoj). Due, kio precipe gravas por mi, mi unuafoje partoprenis en la aranĝo de esperantistoj, antaŭe mi ne havis tian eblon.



Miaj unuaj impresoj estas la plej bonaj, mi unuafoje povis multe paroli en Esperanto, konatiĝi kun la kulturoj de aliaj popoloj, parolante en Esperanto kaj aŭskultante la paroladon de esperantistoj (ĝis tiu momento mia Esperanta praktiko entenis nur internacian korespondadon kaj legadon de E-libroj kaj periodaĵoj). Al mi tre plaĉis partopreni en diversaj aranĝoj kaj konkursoj. Eble mi kiel partoprenanto ne estis tre aktiva. Komence mi iom timis, sed poste alkutimiĝis al homoj, de kiuj fontis la varmo de familio, amo, bonkoreco.

Finfine, mi mem povis aprezi sencon kaj gravecon de nia internacia lingvo por konservado kaj plua progreso de kulturoj en tuta mondo, por la paco ĝenerale. Mi nun sentas min pli preta por serioza aktiva agado en rusia E-movado kaj, certe, unuavice en la movado en Vladimira regiono kun la celo de ĝia renaskiĝo.

Irina Moniĉeva (Muromcevo, Vladimira reg.)

Kelkaj vojaĝas al Oriento reale

"Esperantotur" – Turisma Servo de "Monda Turismo" el Bydgoszcz (Pollando) sendas grupojn al pli ol 130 landoj de la mondo. Dum 20-31-a de majo 2001 ĝi sukcesis sendi ankaŭ la unuan polan-latvan esperantistan grupon al Irano, danke al kunlaboro kun iranaj esperantistoj. Dum dek tagoj la 7-persona grupo, akompanata de 4 irananoj, rondvojaĝis per buseto pli ol 2500 kilometrojn, vizitante la plej gravajn vidindaĵojn de Irano. Oni vizitis kun Esperanto-ĉiĉerono la plej grandajn moskeojn, havante eĉ eblecon ĉeesti islamajn religiajn ceremoniojn. Irano apartenas jam al la landoj, kie funkcias Esperanto-turismo. La grupo havis plenan prizorgon de iranaj esperantistoj ekde la komenco ĝis la fino de la restado.

Andrzej Grzębowski (ret-info)

AROMA JALTO – 2001

Ĉi-foje ne estis la nura festivalo en Jalto dum la majaj festoj. Apudis ankoraŭ du – "Internacia Folklora Festivalo" (kiun oni organizis subtene de ukrainia prezidento L.Kuĉma) kaj "Festivalo de Vinoj kaj Ĵazo" (kie oni povis aŭskulti verajn majstrojn de la muzika arto). Certe ambaŭ tiuj festivaloj estis veraj novuloj kompare kun la 12-a jam "Aroma Jalto" (AJ), sed ili neimageble vigligis la jaltan vivon – plenigis jaltajn stratojn per multegaj homoj kaj aŭtoj. Aldonu al tio kvazaŭ "menditan" sunan veteron (pro kio vestaĵoj, precipe virinaj, aspektis plejparte plaĝsomere). Do, nun vi bone imagas la urbon, en kiu pasis la Esperanta aranĝo.



AJ estis organizita en hejmeca ripozejo "NIVA", kie oni loĝis en sufiĉe komfortaj kondiĉoj. Malgraŭ tio, ke "NIVA" estas en la urba centro, ĝi situas flanke de la centra strato. Kvar ĉefaj unuetaĝaj konstruaĵoj de la ripozejo limigas plenan de subtropikaj kreskaĵoj korton, kie okazis plimulto de tagaj enbazejaj programeroj.

Mem la programo ne portis multe da novaĵoj kompare kun la antaŭa AJ. Estis diversgradaj E-kursoj: elementa (N.Daniljuk, Luck), paroliga (D.Cibulevskij, Ĥarkovo) kaj perfektiga (T.Auderskaja, Odeso). Oni organizis ILEI-ekzamensesion, A- kaj B- seminariojn kaj ekzamenojn pri Ĉe-metodo (E.Bondar, Elk, Pollando).

Okazis kelkaj tradiciaj ekskursoj, inter kiuj tamen mi menciu aparte pri dutaga turista marŝo al Granda Kanjono. Tiu, kiu estis, ricevis fortajn pozitivajn impresojn de ekstrema kolektiva "montarumado" (gvidis la turistan grupon jaltano Vjaĉeslav Katin).

Inter plej rimarkindaj vesperaj programeroj nomu ni koncertan projekton de Sergeo Bozin (Krasnojarsk) "Verda Nebulo", KGS-on (en kiu ludis Jalta, Odesa kaj Kieva teamoj gvide de Pavel Moĵajev, Nataŝa Dobrjanskaja kaj Oleg Pokotilo), intelektajn ludojn de Tatjana Auderskaja kaj orgenan koncerton en Livadia orgena halo.

Dezirantoj havis eblon sperti funkciadon de interreta esperanta "chat" (retbabilejo), demonstrita de Jefim Zajdman; spekti videofilmon kaj aŭskulti detalan rakonton pri Lingva Festivalo en Berdjansko, kiu okazis 17-18.03.2001 (rakontis Konstantin Demjanenko); ĉeesti en prezentiĝo de novaj ukrainiaj Esperantaj periodaĵoj kaj libroj (rakontis: Sergeo Ŝmatkov, Gorlovka – "Esperanto", "Babila Turo", ruslingvaj japanaj krucenigmoj kun lecionoj de Esperanto; Konstantin Demjanenko – interkluba bulteno "Interalie"; Dmitrij Cibulevskij – kultura revuo "Revueto"; konata ukrainia eldonisto, mastro de privata esperanta eldonejo "Bona koro" Vasilj Stanoviĉ – pri finpreparo de granda Esperanto-ukraina vortaro). Ĉu vi ŝatus ion aboni? Se jes, kontaktu min, mi helpos (aznauka@azov.zp.ua).

Entute en AJ oficiale registriĝis ĉirkaŭ 60 homoj el Ukrainio, Rusio, Pollando, Britio kaj Francio.Dum AJ okazis oficialaj UkrEA-estrarkunsido, sub gvido de UkrEA-prezidanto Volodimir Hordijenko, kaj kunsido de ULEI (Ukrainia Ligo de Esperantaj Instruistoj) sub gvido de Nina Daniljuk.

Inter iomaj acidaĵoj eblas nomi tre modestan vesperan programblokon. Koncertoj kaj kelkaj konkursoj nur parte kovris la vesperan tempon. Preskaŭ ne okazis Esperantaj ludoj.

Kial? Estas malfacile diri. Eble pro tio, ke nur nemultaj gepartoprenintoj de AJ estas OkSEJT-aj kutimuloj. Tamen, kiel vi komprenas, preskaŭ ĉiuj faris vesperajn promenadojn en koncertanta Jalto kaj, ŝajnas, vespere, malgraŭ ĉio, neniu enuis.

Resume, AJ nun ne estas la same granda kiel iuj popularaj rusiaj (OkSEJT kaj EoLA) kaj eŭropaj Esperantaj aranĝoj, sed ĝi estas eventoplena renkontiĝo en paradiza anguleto de neforgesebla Krimea Sudo, kie oni ĉiam gastigeme akceptos gesamideanojn el diversaj urboj, regionoj kaj landoj. Ĉi tie oni tradicie parolas en Esperanto (kaj speciale zorgas pri tio): eksterlandanoj ne sentos sin fremdaj, kaj komencantoj havos eblon praktiki la lingvon. “Aroma Jalto”! Ĝis la revido!

K. Demjanenko (Berdjansk)

* * *

Denove printempo kaj denove lazuraj bordoj de sunplena Jalto renkontis nin la 29-an de aprilo. Nia Odesa klubo “Verdaĵo” 12-persone veturis al la renkontiĝo “Aroma Jalto”. Perfekta vetero, belega naturo, tute malsimila al nia Odesa naturpejzaĝo. Mirindaj kaj nebulaj montoj ĉirkaŭ la urbo kaj neimageble blua maro kreis la etoson de romantiko kaj amikeco.

La ripozejo, kie ni loĝis, ne surprizis nin per ŝikaj ĉambroj, sed tio ne gravis, ĉar ni ne havis tempon por resti tie. Ni bezonis la ĉambrojn nur por manĝi kaj dormi. La intensa programo de printempa renkontiĝo ne lasis tempon por ripozo. La verda kaj alloga korto ĝuste taŭgis por amikemaj lecionoj ĉiumatene. Estis tri grupoj de lernantoj: komencantoj, kune deklamintaj versaĵojn, la grupo de progresantoj – la plej interesa kompanio, kaj kelkaj homoj, kiuj jam perfekte scipovas la lingvon, sed volas plu perfektigi ĝin aŭ ekscii ion novan pri la lingvo. Post tagmanĝo ĉiutage okazis ekskursoj: tra la urbo, al montoj, al Livadia Palaco, al Nikita Botanika Ĝardeno, al Kabo Martjan k.t.p.



La plej grandan impreson faris marŝo al montoj, sur Aj-Petri kaj en Granda Kanjono. Tio estis dutaga irado kun dorsosakoj, tre laciga, sed malgraŭ tio, mirinda. La unuan tagon ni iris al Kanjono kaj tie ni starigis tendojn kaj noktumis. Tiuvespere ni tre multe parolis, anekdotis, ludis “Mafion”, tetrinkis, bakis terpomon k.t.p. Krom tio ĉi-tage nin atendis intelektaj kaj sportaj ludoj kaj konkursoj. Ĉiu havis eblecon prezenti kaj provi sin mem.

Kiel kutime estis organizataj gajaj ludoj – KGS kaj “Brejn-ringo”. Funkciis butiko, kie oni povis aĉeti librojn en Esperanto pri la movado kaj gravaj E-personoj. Tiuj, kiuj volis ekzameniĝi kaj ricevi rajton instrui Esperanton, havis tiun eblon dum “Aroma Jalto”. Preparadon al ekzamenoj de kategorioj A kaj B organizis Eva Bondar – pola instruistino de Esperanto. Estas menciinde, ke la lingva ordo estis strikta kaj oni rekomendis paroli kun eksterlandanoj. Ĉi-foje partoprenis du britoj kaj Ĉefdelegito de UEA el Francio. Funkciis “Verda Brigado” sub gvido de Kostja Demjanenko, kiu serĉis krokodilojn.

Post spektado de la videofilmo pri Lingva Festivalo en Berdjansko, kiu havis grandan sukceson, ni ĉiuj ekflamis pri la ideo organizi similan festivalon. Tio estas realigebla, ĉar Odeso estas multnacia urbo kaj nia klubo estas sufiĉe forta por aktiva agado. Krom tio, certe, lingva festivalo pligrandigos intereson al Esperanto mem kaj al la lingvaj problemoj. Tiu renkontiĝo en Jalto unuigis nin kaj inspiris al bonaj kaj utilaj agadoj. Ni esperas ke en sekva printempa “Aroma Jalto” ni povos rakonti pri nia Odesa festivalo.

Olga Gribovan (Odeso)

Estontaj aranĝoj

Amikoj renkontiĝas en Novosibirsko

Novosibirskaj esperantistoj invitas ĉiujn al RA-1 (***Renkontiĝo de Amikoj***), kiu okazos de la 30-a de junio ĝis la 6-a de julio.

Loko: en la ŝipo ĉe bordo de Obskoje maro (40 min de metroo per buso) apud Novosibirsk. **Prezoj:** 520 rubloj por junuloj ĝis 25 jaroj, 560 rubloj por ceteraj. La prezoj inkluzivas: loĝadon en 4-litaj kajutoj (NB: Kunportu proprajn littolaĵojn!) kaj manĝadon (2-foje tage plus vespera teumado). **Lerna programo:** kursoj por komencantoj, por progresantoj, komuna kantado por lerni E-kantojn.

Distra programo: naĝado, boatado (per motora kutro), pafado (per pneŭmatikaj fusiloj), tabloteniso, katamarano, surfado. En la ŝipo estas ĉambro kun televidilo kaj videomagnetofono. Estas ankaŭ mizikaparataro. Ĉiuvespere, certe, okazos lignofajro. Apude estas bazejo, kie oni havas diskotekojn, dezirantoj povas danci, sed devas pagi. Estas planata ankaŭ la ekskurso tra Novosibirsk por aliurbanoj (kontraŭ aparta pago).

Ne estas multe da lokoj. Aliĝu laŭeble pli frue, per la retadreso <JK@CENTER-F1.ru>. Eblas kontakti kun la organizantoj ankaŭ per la telefonnumero (3832) 468494.

Katerina Arbekova.

Vojo al Hindio!

Jam komenciĝis la somero. Ĉu vi jam scias, kion vi faros en julio?.. Fiksu en via notlibro per grandaj literoj: IGRA (Iniciata Grupo de Rusiaj Aktivuloj) organizas ekspedicion al Hindio. Por tio vi ne bezonas vizojn – nia Hindio situas tre proksime, ĉe Ĉeboksari!

Ni startos el Ĉeboksari la 21-an kaj revenos tien la 29-an de julio. La organizantoj atendos la partoprenantojn en la atendejo de la fervoja stacidomo de Ĉeboksari la 21-an matene, inter la 8.30 kaj la 11.00. Estos tri grupoj. La unua startos jam matene, ĝis la 11.00; ĝi konsistos el ĉirkaŭ 10 homoj, kiuj dekomence studos kaj poste flugos per paraplanoj (direkteblaj paraŝutoj), tio kostos 150 rub. La dua grupo startos tage, ĝis la 14.00. La unuan tagon oni lernos kaj trejniĝos, la duan kaj la trian tagojn rajdos ĉevale, tio kostos 550 rub. La tria grupo startos vespere, ĝis la 18.00. Ĝi marŝos, tio kostos neniom.

Dum la vojo la grupoj praktikos jogon, filozofion, batalartojn ktp. La 23-an de julio vespere ĉiuj tri grupoj kunvenos en nia tenda Hindio ĉe lagoj kaj komenciĝos la baza periodo. ***La kotizo por ĝi, kiu inkluzivas la manĝon kaj partoprenon, estas 400 rubloj.***

Dum la tendaro vi lernos kulturon kaj tradiciojn de Hindio, manĝos nacian hindan lignofajran manĝon, rolludos pri hinda mitologio; vi vestiĝos, dancos, ritos kiel veraj hindoj, festos hindan Novjaron (jes, ĝi okazas somere!), studos fari silicajn laborilojn, ornamaĵojn kaj potojn el argilo, branĉkabanojn, trabajn flosilojn, pentros farbe kaj krajone, skulptos...

Por esti pretaj al ĉio, bonvolu kunporti: manĝilojn (kruĉo, kulero, telero, tranĉilo), hindajn vestaĵojn, ornamaĵojn kaj muzikilojn, naĝ- kaj sport-kostumon, ion varman (kiu scias la veteron?), kromŝuojn, kontraŭkulajn rimedojn, lanternon, dormosakon, tendon (se vi preferas la propran), kaj ĉion, kion vi opinias inda kunhavi...

Al la tendaro jam aliĝis niaj geamikoj el Ĉeboksari, Dimitrovgrad, Gorlovka (Ukrainio), Ivanovo, Lipeck, Moskvo, Sankt-Peterburgo, Uljanovsk. Ankaŭ vi pensu! Indas! Kaj hindas!

Kontaktu la ĉeforganizantojn: ***Dima Oŝĉepkov*** *– (095) 1973162 (h), (902) 6966596 (portebla, funkcias ankaŭ en Ĉeboksari), <dmir@online.ru>;* ***Oĉjo Dadaev*** *– (902) 6775935 (portebla, funkcias ankaŭ en Ĉeboksari), <esperanto@online.ru>;* ***Saŝa Fedotova*** *(kontaktu ŝin en Ĉeboksari) – (8352) 562029 (h), 621064 (o), <sasxa@usa.net>.*

Do – “VOJO AL HINDIO”, kiu daŭrigas gloran tradicion de “Fratoj-Slavoj” kaj “Ellada”, atendas vin!!! Ni esperas, ke ĉiuj tie sukcesos trovi sian Vojon al sia Hindio...

OrSEJT-33!

La sukcesa OrSEJT-32, okazinta apud Tomsk somere 2000, konfirmis ke E-movado en la azia parto de Rusio bezonas sian grandan E-renkontiĝon. Tial ni tre ĝojas anonci, ke ankaŭ ĉi-jare OrSEJT okazos, en la periodo 01-10 de aŭgusto, 2001 apud Tjumenj.

La ĉeftemo: **Dialogo inter civilizacioj.**

PROGRAMO. La temo de OrSEJT-33 estis lanĉita ankoraŭ en OrSEJT-32 kaj, certe, ne hazarde. Kio povas esti pli konvena al la baza ideo de Esperanto ol kontaktoj inter popoloj – kulturoj – civilizacioj? Rememoru ni ankaŭ la ŝercan miton, ie-tie vagantan inter esperantistoj, laŭ kiu la komuna lingvo, kiun parolis homoj antaŭ la babela intermiksiĝo de lingvoj, estis ĝuste Esperanto. Multaj jaroj pasis post tiu tempo. Generacioj ŝanĝis unuj la aliajn. Sed plejmulto el la pasintaj epokoj, ve, senspure pereis, superŝutita de temposablo. Kaj plimulto el la resto por ni ekzistas nur kiel historiaĵoj, kovritaj de nebulo. Tial, prenante la temon "Dialogo inter civilizacioj" ni, la organizantoj de OrSEJT-33, starigis antaŭ ni la celon veki intereson al la kultura heredaĵo de homaro.

OrSEJT-33 donos al vi la unikan ŝancon dum dek tagoj de la tendaro travivi preskaŭ la tutan historion de la homaro de ties sovaĝaj tagoj tra la antikvaj civilizacioj de Egiptio, Grekio kaj Romo ĝis la ĵus naskiĝinta tria jarmilo. Intertempe vi konatiĝos ankaŭ kun riĉaj orienta kaj indiana kulturoj, partoprenos rekonstruadon de mita Atlantido, spertos enigman eksterteran vivon kaj fine havos la eblon provi viajn fortojn en kreado de eventuala civilizacio de futuro.



Do, se vi interesiĝas pri historio, kulturo, antropologio aŭ por vi ne sufiĉas posedi nur Esperanton kaj vi revas parkerigi kelkajn vortojn indiane por vojaĝi Ameriken, aŭ vi denaske ĝis nun uzas hieroglifojn anstataŭ cirila aŭ latina alfabetoj, aŭ vi simple estas gaja, simpatia, plena de energio kaj deziro kiel eble plej aktive ripozi – sciu, ke ĉi-aŭguste ĉiuj vojoj kondukas vin al Tjumenj – al OrSEJT-33!

La tradiciaj tendaraj programeroj (kiel Neptunfesto, Tago de naskiĝintoj, KGS, "Kuru-Kuru" kaj aliaj vaste konataj amuzaĵoj) ne bezonas iun ajn reklamon. Krom ili vin atendas diversspecaj konkursoj: lingvaj (interpretista, tradukista, oratora), belartaj (poezia, muzika), amuzaj (konkurso de anekdotoj), utilaj (kuirista), senutilaj (vira konkurso de beleco), intelektaj (analogie al kelkaj televide konataj ludoj) kaj multaj ceteraj neklasifikeblaj konkursaĵoj. La prelega parto estos dividita je cikloj laŭ temoj. Inter ili aparte menciindaj estas la cikloj "Mondaj artoj" kaj "Mondaj religioj". La vorto "dialogo" en la temo de la OrSEJT faris neevitebla ĉeeston en la programo de diversaj diskutrondoj inkluzive tiujn pri Esperanto, E-movado kaj E-organizoj.

La tendara kursa parto, samkiel la prelega, konsistos el kelkaj cikloj: diversnivelaj E-kursoj, artaj, sanigaj, praktikaj (aplikaj) kursoj kaj atendas siajn majstrojn (t.e. – vin) por fari la tendaran vivon pli kompleta, varia kaj interesa. Do, venu kaj ne forgesu kunpreni iom da esperantaĵoj (libroj, periodaĵoj, insignoj, kasedoj k.s.) por butiko, aŭkcio kaj loterio.

LOKO. OrSEJT okazos en la eksa pionira tendarejo "Ĉajka-2". Ĝi situas 30 kilometrojn suden de Tjumenj, apud vilaĝo Ĉerviŝevo, borde de la pura rivero Piŝma. Partoprenantoj havos eblon **loĝi** sur litoj en ĉambroj, surplanke en ĉambroj, aŭ en propraj tendoj.

La dometoj estas lignaj, kaj ĉiu ĉambro estas destinita por 5-6 personoj. Dezirantoj loĝi surplanke ricevos je la dispono similan ĉambron. Principe necesas kunporti la proprajn dormosakon kaj tapiŝeton, tamen kontraŭ plia sumo (negranda) estos disponigitaj sportmatracoj. Tendumantoj devos kunporti la proprajn tendon, dormosakon kaj tapiŝetojn (la menciitaj matracoj ne estas uzeblaj en tendoj). La **manĝo** okazos 4-foje tage. Eblos mendi apartajn manĝojn.

Je nia dispono estos kelkaj ludaj placetoj (por piedpilko, retpilko k.t.p.). Laŭ promesoj de la tendarej-estraro, duŝejo kun varma akvo funkcios konstante. Probable funkcios ankaŭ ŝvitbanejo. Estos loko por lignofajro.

ALIĜKOTIZOJ. Ĝis la 15-a de julio 2001 – 60 rubloj, poste (surloke) – 80 rub. La aliĝkotizo inkluzivas aliĝon, partoprenon en la programo kaj kovron de organizaj elspezoj.

Kaŭcio por pasiva partoprenado estas 50 rub. La kaŭcio pagendos dum registrado, kaj estos repagita fine de la aranĝo, se vi aktive partoprenos kaj/aŭ organizos minimume 5 programerojn de OrSEJT.

Por aliĝi sendu aliĝilon (ĉu rete, ĉu papere) kaj aliĝkotizon al: Gennadij Fjodoroviĉ BASOV, 634055, Tomsk-55, a/k 2289 (Геннадий Фёдорович БАСОВ, 634055, Томск-55, а/я 2289). **Atentu!** Sen aliĝkotizo via aliĝo ne validos, kaj ne estos traktita.

RABATOJ: 1) infanoj ĝis 10 jaroj rajtas je la 50%-a rabato de la aliĝkotizo; 2) samfamilianoj (pli ol 10-jaraĝaj) rajtas je la 25%-a rabato de la aliĝkotizo.

LA ORGANIZA KOMITATO

Mansur MAMKIN	**Jelena KATAJEVA**	**Gennadij BASOV**	**Grigorij AROSEV**
(Tjumenj)	***(Tomsk-Moskvo)***	***(Tomsk)***	***(Moskvo)***
ĉeforganizanto lokaj kontaktoj <esperanta@mail.ru> (3452) 465315 (ofica , petu konekti vin kun loka numero "103")	programo <jelena@land.ru> (095) 4761472 (ĝis la 30-a de junio) (3822) 773514 (post la 3-a de julio)	ĝenerala kunorganizado, teknikaj aferoj <gbasov@hcei.tsc.ru> (3822) 258966 (of)	financoj, retpaĝo <arosev@rambler.ru> telefonnumeroj same kiel ĉe Katajeva

DETALOJ. Multajn detalojn vi povas trovi en la oficiala ttt-ejo de OrSEJT-33 <http://OrSEJT.boom.ru>. Krom ĉi-supraj informoj tie situas: pli detala priskribo de la programo, ĉiuj prezoj, elektronika aliĝilo, kelkaj fotaĵoj de la onta OrSEJTejo, ligoj al retpaĝoj pri Tjumenj. Krome, la paĝo estas konstante ĝisdatigata – do vizitu ĝin ofte por havi la plej freŝajn informojn pri OrSEJT-33!

* * *

OkSEJT-41. Post longaj serĉadoj, hezitoj, diskutoj REJM-komitato komence de junio decidis okazigi la tendaron meze de aŭgusto (en la antaŭe anoncitaj datoj kun eventuala moviĝo je 1-2 tagoj) apud Vladimir aŭ Kostroma. Aktive daŭras la preparado de la programo. Baldaŭ devas aperi la unua Informletero pri OkSEJT-41, per kiu vi ekscios ĉiujn bezonatajn detalojn. La informoj estos vaste anoncataj ankaŭ en la reto. La detalojn eblas ekscii ĉe Nataŝa Grigorjevskaja (poŝte – 153034, Ivanovo, str.Smirnova 87-16; telefone – (0932) 426433; rete – <grina@inbox.ru>).

* * *

REK-21. Laŭ decido de REU-Estraro vica 21-a Rusia Esperantista Kongreso okazos en la urbo Kostroma de la 12-a ĝis la 16-a de decembro 2001. Sed la tuta aranĝo daŭros plenan semajnon, ĉar ekde la 9-a de decembro en la sama loko okazos antaŭkongreso, por kiu estas planataj seminarioj, diversgradaj E-kursoj, ekskursoj tra la urbo, interesa vespera programo kaj multo alia. Por partopreni en REK-21 estos invitataj multaj E-aktivuloj, verkistoj, artistoj el nia lando kaj interesaj gastoj el eksterlando, konkretaj traktadoj jam okazas, la no-

mojn vi baldaŭ ekscios. En la programo de la Kongreso estas planata speciala matineo, dum kiu estos anoncitaj la plej altaj atingoj de Rusia Esperantujo en 2001, ekz. la Esperantisto de la jaro, la Klubo de la jaro, la Libro de la jaro, la Kanto de la jaro k.s. (estas ideo anonci ankaŭ la fuŝojn de la jaro). En junio devas esti subskribita la kontrakto kun la ripozejo "Berjozovaja roŝĉa", en kiu estas planata okazigi la kongreson. Tuj poste estos preparita la Informletero kun la aliĝilo kaj kotizoj.

* * *

EoLA-14. Jam estas decidite far REU-Estraro kaj REJM-komitato ke en 2002 la festivalo EoLA-14 okazos en Ĉeboksari komence de marto.

* * *

Internacia Junulara Seminario. La 14-a Internacia Junulara Seminario, IJS okazos 13-19.07.2001 en Szombathely, Hungario. La temo de la ĉi-jara IJS estas "Muziko" kiel internacia lingvo. La organiza teamo, la temo kaj la partoprenantoj garantias vere bonan, amuzan, aktive ripozigan etoson dum la plej tradicia kaj plej granda mezeŭropa junulara aranĝo. Ankaŭ la ĉi-jara IJS donas al la partoprenantoj surprizojn, ekskurson, iom da "tradicia akvumado" kaj dumnoktan dancadon ĝis la "preskaŭ-morto".
Haveblas perinterreta aliĝilo al IJS ĉe <http://www.esperanto.hu/hej>.
Estas organizota karavano al la UK en Zagrebo, kiun eblas partopreni.
Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe: Hungara Esperanto-Junularo, Pf.87; HU-1675 Budapest, Hungario. ***(ret-info)***

* * *

Kongreso de junaj sciencistoj. La 4-a Kongreso de la Junaj Sciencistoj de Azi-Pacifikaj landoj okazos 09-13.08.2001 en Vladivostok surbaze de la Teknika Universitato. Okazos entute 20 sekcioj, inter kiuj "Esperantologio kaj interlingvistiko". La laborlingvoj de la kongreso estos rusa, Esperanto kaj angla. Dum la Kongreso oni festos la 110-jariĝon de Esperanto-movado en la Fora Oriento. Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe Esperanto-klubo "Pacifiko", La For-Orienta Ŝtata Teknika Universitato, str.Puŝkinskaja 10, RU-690950 Vladivostok; rete <oriento@mail.ru>. ***(Eventoj)***

Moseo revenas de la monto Sinajo kaj diras al la atendanta lin popolo: "Mi havas por vi du novaĵojn – bonan kaj malbonan. La bona – ni interkonsentis, ke estos nur dek reguloj, la malbona – adulto tamen estis inkluzivita."
(esperanto-anekdot)

* * *

Renkontiĝo de E-familioj. La 23-a Renkontiĝo de Esperanto-Familoj, REF okazos 28.07-07.08.2001 en Savudrija, Kroatio. REF estas aranĝo por familioj kun infanoj, kiuj aktive aŭ pasive uzas Esperanton, kaj por junaj paroj, kiuj eble edukos siajn infanojn denaske al Esperanto. En la programo estas multaj amuzaĵoj, interesaĵoj kaj ripozeblo. Oni povas aktive kaj bonetose ferii dum pli ol unu semajno en Esperantio. Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe: Rondo Familia, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ-Rotterdam, Nederlando; rete <jagnjic@zg.tel.hr>.

* * *

La Internacia Esperanto-Konferenco (IEK) kun la temo "Scienco kaj Scio" okazos 20-26 de julio 2002 en Leuven (Belgio). Ĝin, same kiel dek kvar antaŭajn IEK en dek unu landoj, okazigos Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj (OSIEK). La Konferencon kunorganizas oficiale la Universitato de Leuven, la plej malnova ankoraŭ ekzistanta katolika universitato en la tuta mondo. Pli detalajn informojn kaj la aliĝilon eblas peti de la organiza komitato, nomata "Esperanto 3000": R.Ménada 44, BE 1320 Hamme-Mille; rete <esperanto3000@esperanto.be>.

Bulteno de REU

La decidoj de REU-Estraro

faritaj dum la kunvenoj 30.04 en Vladimir kaj 03.05 en Moskvo:

1. Okazigi vican REKon decembre 2001 en Kostroma, sen la Konferenco de REU; proksimumaj datoj estas 12-16-a de decembro.
2. Esplori la eblecon okazigi ekde la jaro 2002 someran tendaron de REU (provizora nomo RETo).
3. Aprobi la jenajn listojn:
   a) regionaj kunordigantoj de REU: Junusov (Suda Rusio, kun la kondiĉo ricevi lian konfirmon), Bronŝtejn (Nord-Okcidento), Titaev (Fora Oriento), Gonĉarova (Centra Rusio);
   b) reprezentantoj de REU: Bespalov (Soĉi), Belov (Tiĥvin), Delcov (Irkutsk), Galkin (Kazanj), Kolosov (Volgograd), Ejst (Sankt-Peterburgo), Bronov (Krasnojarsk), Kuznecov (Kostroma), Lineckij (Ukrainio), Minin (Usono), Vasiljev (Vladimir), Arbekova (Novosibirsk), Ogurcov (Voroneĵ), Kapitonov (Ĉeboksari); la aprobo por Galkin, Ejst, Kuznecov, Lineckij, Minin, Kapitonov validos post ilia membriĝo en REU.

Kluba Ranglisto de REU

REU lanĉas funkciadon de Kluba Ranglisto (KR) por E-kluboj en nia lando. Surbaze de la havataj informoj pri la REU-kluboj kaj nealiĝintaj E-kluboj REU preparos kaj regule publikigos KR. Definitiva varianto de KR por la jaro estos anoncita en decembro dum Rusia E-kongreso, tie okazos premiado de la plej bona klubo de la jaro. Loko de la kluboj en RK dependas de la kvanto de poentoj, kalkulataj laŭ ĉi-suba Poenta listo. La poentoj estos atribuataj nur por agado dum la kuranta jaro.

La Poenta listo

La klubo:

– estas aliĝinta al REU – 10
– plus por ĉiu aligita membro – 1
– por ĉiu estrarano, komitatano, komisiito, reprezentanto de REU aŭ REJM – 5
– por ĉiu delegito (inkluzive vic-, junular-, fakdelegitojn) de UEA – 3
– por ĉiu individua membro de REU, REJM, UEA/TEJO – 2
– havas regulajn kunvenojn
  foje semajne – 20
  2-3 foje monate – 10
  malpli ofte – 5
– okazigis E-kurson – 5
– plus por ĉiu kursfininto – 2
– por ĉiu ekzameniĝinto de ĈALK por la kategorio
  A (aŭ ekzameno de REJM) – 2
  B – 10
  C – 20

– organizis E-renkontiĝon kun partopreno de
ĝis 10 aliurbanoj – 20
11-30 aliurbanoj – 30
31-50 aliurbanoj – 50
pli ol 50 aliurbanoj – 100
– organizis lokan E-seminarion – 20
– plus por ĉiu membro, partopreninta en E-renkontiĝo – 2
– publikigis nacilingvajn artikolojn pri E-o, radioelsendon, televidan elsendon
en centra amaskomunikilo – 50
en la regiona – 30
en la loka – 10
– eldonas kluban bultenon – 10-30
– plus por ĉiu aperinta numero – 10
– havas retpaĝaron – 20
– partoprenis tutlandan aŭ internacian kunlaboron, por ĉiu kampanjo 10-40
– organizis amasan poreksteran aranĝon, lekciojn pri E-o, ekspozicion, koncerton k.s. – 10-100
– kontribuis al amasa porurba aranĝo – 10-30
– teame partoprenis en preparado de nepropra/aliurba E-renkontiĝo – 5-40
– pro la partopreno de la klubanoj en Lingva Olimpiko aŭ BeLego – 5-30
– pro artikoloj en landa kaj internacia E-gazetaro, informo en Ret-Info – 1-30
– adreso de klubano en Pasporta Servo – 2
– akcepto de eksterlandaj gastoj – 1-10
– aliaj nemenciitaj aktivecoj – 0-1000

Novaj aliĝoj

Nova dumviva membro aperis en REU – koncernan kotizon pagis ***Garik Kokolija.***

Nova aliĝinta kolektivo fariĝis ***Vladivostoka E-klubo "Pacifiko"*** (10 membroj).

Kaj ankoraŭ 10 gesamideanoj fariĝis individuaj membroj de REU: ***Ĉernov Sergej (Magadan), Kopajev Jurij (Kursk), Kudrjavcev Viktor (Jekaterinburg), Lunjova Jelena (Jelec), Petrov Aleksej (Jelec), Polkovnikova Svetlana (Lipecka reg.), Saljkova Galina (Jelec), Sapoĵnikov Vladimir (Krasnojarsk), Vasiljev Viktor (Vladimir), Vicjko Natalja (Jelec).***

Rezulte por la 10.06.2001 REU havas 44 dumvivajn membrojn, 107 individuajn membrojn, 3 familiajn membrojn kaj 9 REU-klubojn kun 84 aligitaj membroj.

Kun tiu ĉi REGo ĉiuj membroj ricevos la membrokartojn kaj la broŝuron kun REU-statuto kaj ĉiuj Regularoj. La aktive preparata Jarlibro de REU estos preta kaj dissendata fine de junio.

REU-kotizoj por la jaro 2001:

60 rub. (por eksterrusianoj – 10 eŭroj) – individua kotizo (inkluzivas la membrokarton, REGon kaj aliajn informojn, voĉdonrajton dum REU-konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj);

1500 rub. – dumviva kotizo (ĉio la sama dum la tuta vivo);

20 rub. – familia kotizo (la membrokarto, voĉdonrajto dum REU-konferenco);

60 rub. + 20 rub. por ĉiu membro – kolektiva kotizo (la membrokartoj, REGo kaj aliaj informoj de REU por la klubo, voĉdonrajtoj dum REU-konferenco).

*La rublaj kotizoj sendendas al **G.Kokolija** (la adreso estas en la lasta kovrilpaĝo), la eŭra kotizo pagendas al la konto **reua-p** ĉe UEA.*



REJM-info

redaktas Vitalik Malenko

Movadaj pensoj



Karaj miaj samideanoj! Kiom longe ni posedas Esperanton? Kiom longe ni agadas por E-movado? Kaj kion ĉiu el ni povus fari por plenumi ĝiajn celojn? Tute ne freŝas tiuj demandoj. Sed unue kiaj por vi estas celoj de Esperanto-movado?

Persone mi lernis Esperanton per du lernolibroj: de Gonĉarova kaj de Kolker. Tiu de Kolker rakontis al mi, ke laŭ ideo de d-ro Esperanto celoj de la lingvo kaj movado estas homaranismo, aŭ eĉ "frateco kaj justeco inter popoloj". Certe ni ne forgesu ankaŭ pri internacia lingvo kiel dua helplingvo. Bonvolu korekti min, se mi eraras, ĉar jam delonge legis nenie pri la ideoj de Esperanto, des pli pri ili neniu mencias dum diversaj E-aranĝoj – estas bona ŝanco forgesi!

Jes, ni sukcesis ellerni la Internacian Lingvon, kaj kion ni faras per Esperanto, kiel ni uzas ĝiajn ideojn? Rakontas pri Esperanto al konatoj? – Bone! Penas tiujn konatojn venigi al E-kursoj? Ankoraŭfoje bone! Kio krome? Kio pri la dua lingvo? Kio pri la frateco inter popoloj? Por tio ne restas tempo? Eĉ se ni havos liberan tempon por E-agado ni preferos pensi pri OkSEJT kaj aliaj distraĵoj, ĉu ne? Kelkaj tamen sukcesas ekorganizi E-kursojn por krei samajn konsumantojn de Zamenhofa lingvo. Kaj kion faras tiuj konsumantoj post fino de E-kurso? Veturas al OkSEJT, krokodilas tie kun similaj amikoj, lernas danci, kudri, trovas koramikinon, kunkantas iun E-kanton kaj komprenas ke tiu E-etoso estas ĝuste tio, kion li bezonas. Sed eble pli facile por ni estas ekokupiĝi pri io alia, sed ne pri la Internacia Lingvo kaj movado? Ekzemple pri ekologio – tio nun multe pli aktulas. Kelkaj saĝuloj kaj ne pigruloj komprenas tion; kaj kie ili estas post du jaroj de movadumado-etosumado? Malaperas… Kiom multaj ni, esperantistoj, nun estas en la mondo? Ne eblas kalkuli? Eble ni simple penas forgesi, ke ni terure malmultas. Kial? Eble ne plu aktualas ideoj de Zamenhof? Aŭ eble troviĝis alia lingvo kun pli allogaj ideoj? Laŭ mi Zamenhof vere donacis al ni la Internacian Lingvon kun klaraj indaj ideoj, sed kion ni faras kun tiu ILo? Estas honte eĉ diri...

Certe mi troigas iom. Ekzistas homoj, kiuj ne forgesis pri idealoj, kiuj strebas ŝanĝi la nunan aspekton de nia Raumisma movado. Ankaŭ mi volus esti inter ili. Ankaŭ vin ĉiujn mi ŝatus inspiri pri E-ideoj. Kiuj ĝuste? Tute facile:

1. Interkulturo ("Frateco kaj justeco inter popoloj"). Sciigi popolojn pri internacieco tutmonda. Nun socioj estas multekulturaj, sed ni strebu fari ilin interkulturaj. Pere de Esperanto eblas konatigi popolojn kun riĉaĵoj de aliaj kulturoj, pri tradicioj, moroj ktp. Ni jam komencis labori ĉi-direkten – ekzemple Lingvaj Festivaloj. Grandan laboron ni povas trovi en lernejoj. Ja ĝuste al infanoj indas rakonti pri diversaj kulturoj, por ke poste ni havu malpli da ŝovinismo, rasismo, sed pli da toleremo, estimo en nia socio.

2. Persona kresko. Dum lastaj jaroj esperantistoj interesiĝas pri arto (EoLA), historio (diversaj lokaj E-renkontiĝoj), psikologio, lingvoj. Eblas disvastigi sciojn, kiujn ni posedas. Ni, esperantistoj, povus helpi organizi kursojn pri lingvoj, pri psikologio, pri aliaj indaj por membroj de socio aferoj. Ni ne devas disvastigi sciojn nur inter nia malvasta rondo, sed eksteren.

3. Esperanto kiel la dua lingvo. Ĉiuj komprenas pri la utileco de internacia lingvo. Posedantaj la anglan komprenos tion facile se vojaĝos en Eŭropon. Sed ankaŭ Esperanto havas ja grandan potencialon, tamen ni ĝin preskaŭ ne uzas. Nur imagu, se en ĉiu granda urbo de la mondo ekzistus E-turisma agentejo, kie laborus homoj, posedantaj Esperanton! Tuj aperus serioza stimulo por lerni la lingvon.

Certe estas nur mia teorio. Mi mem ankoraŭ ne plene ĝin akceptis, do, ne atendas, ke vi tuj kuros plenumi tiujn celojn. Sed ŝajnas al mi, ke ni devas serioze ŝanĝi principojn de nia nuna movado. Laŭ mi nia nuna movado ne havas celojn, kial do ne uzi ĉi-suprajn? Ja sen celoj ajna movado ne havas sencon, ĉu ne, samideanoj? Ĉu ni ankoraŭ restas samideanoj?

Amike kaj idee via Vitalik Malenko

REJManoj rakontas pri sia agado.

Kaĉo el pensoj

Antaŭ kelkaj jaroj en la ruslingva Interreto entute ne estis ajnaj lernomaterialoj pri Esperanto. Dank' al niaj entuziasmuloj iom post iom ili aperis – la plej grandan aron da lernomaterialoj ĉiam havis kaj havas nun la servilo de Jurij Finkel <www.esperanto.mv.ru>, kie ajna interesiĝanto povas trovi kaj Bokarev-vortaron, kaj lernolibron de Kolker, kaj multajn materialojn krome. Sed en la nuntempa Interreto estas ankoraŭ unu ege populara agadkampo – ne simple disponigi lernomaterialojn, sed distance instrui. Inter specife bonaj trajtoj de tia instruado oni povas nomi malgrandajn elspezojn (kompare kun paperpoŝtaj distancaj kursoj), tujan rapidecon de mesaĝoj ktp. Interese, ke lingvojn oni kutime ne instruas rete (aŭ instruas malbone) pro tio, ke vere malfacilas ion fari pri modela prononcado, pri multegaj nelogikecoj de gramatiko kaj aliaj trajtoj de nacilingvoj. Sed Esperanto ja estas bonega escepto – do tute logike aperis ruslingva distanca kurso pri Esperanto.

La kurso baziĝas sur la fama lernolibro de Boris Kolker, iom prilaborita por la reta uzado. S-ro Kolker mem foje partoprenas niajn diskutojn. La kurso funkcias kiel kutima dissendolisto – nur abonante oni ricevas dudekon da leteroj kun lecionoj. Ĉiu lernanto do vidas aktivecon de siaj kunlernantoj, povas iel reagi al ajna letero, aperas etoso de komuna vivo kaj komuna progreso. Certe iuj ne ŝatas la sistemon, kiam oni devas ricevi po 10-15 leterojn tage, kaj ili foriras el la dissendo – sed kion fari? Ĝis la individua kurso ni ankoraŭ ne maturiĝis, kaj eĉ konsideras ĝin neefika.

La ideo de tia kurso unuafoje aperis ĉe s-ro Griŝin el Latvio. Nun la plej aktivaj instruistoj en la listo estas Slavik Ivanov kaj Aleksandr Osokin (Peterburgo), Anna kaj Mati Pentus (Moskvo), Aleksandr Galkin (Kazanj), Nata Kurtanidze (Tbilisi), Andreo Penjkov (Moskvo). Plejparto de la instruistoj mem finis la saman kurson antaŭnelonge, sed ili jam bone posedas la lingvon. Pro sufiĉe granda kvanto de la gelernantoj antaŭnelonge nia kurso dividiĝis je du. Plejparto da instruistoj restis en ambaŭ listoj – do fakte estas kvazaŭ unu lernejo kun du klasoj (***rus-esper-instru*** kaj ***esperanto-kurso*** ĉe ***yahoogroups.com***). Inter la instruistoj senĉese okazas diskutoj, esplorantaj eblojn plibonigi la kurson, fari iajn elekteblojn por niaj estontaj lernantoj (elekti lernomaterialojn, elekti rapidecon de studado ktp.). La retpaĝo pri la kursoj troviĝas ĉe <http://esperant.euro.ru/kursoj/>. La geografio de la kurso, kiel vi povas kompreni, estas vastega – ni havas lernantojn el aktivaj E-centroj (Moskvo, Peterburgo, Ivanovo, Kievo), el aliaj urboj (Petrozavodsk, Tverj, Tula, Krasno-

dar), el eksterlando (Ukrainio, Belorusio, Kartvelio, Germanio, Usono, Japanio). La ekzisto de la kurso ne nur helpas propagandi Esperanton, sed rimarkeble stimulas disvastigi la movadon – ekzemple nia speciala fierindaĵo estas nova klubo en Voroneĵ, kiun lanĉis nia bona lernanto Sergej Ogurcov.

Ne vokas ajnajn dubojn, ke Interreto en la ĵus veninta jarcento ne nur helpos esperantistojn rapidege ŝanĝi informojn inter si, sed ankaŭ iĝos unu el la plej gravaj, eble eĉ la plej grava ilo de instruado. Ĉi tie mi volus iom tuŝi politikon de la movado, kaj mian vidpunkton pri ĝi. Mi mem ellernis Esperanton aŭtodidakte (kun sufiĉe granda helpo de retaj materialoj) – do mi venis en Esperantion ne pere de ĝia kulturo (kiel oftege okazas en Rusio kaj ne nur), sed pere de ĝia lingvo. Tial mi bone scias, ke lerni la lingvon eblas ne nur en E-klubo. Iam aperis bonega klasifiko: 1) esperantistoj – homoj, kiuj estas parto de Esperanta kvazaŭ-etno, kiuj multe scias pri E-kulturo, E-historio ktp. 2) E-lingvanoj – homoj, kiuj scipovas uzi Esperanton, uzas ĝin por ajnaj celoj, sed ne estas parto (almenaŭ “aktiva” parto) de la t.n. Movado. Retaj kursoj estas bonega ekzemplo de pure lingva instruado sen sektecnaciece aspektanta torento da popolaj kantoj, literaturaj esploroj kaj ĉio simila, eble grava kaj interesa, sed ne ĉiu ja interesiĝas pri etnografio de artefaritaj popoloj. Se ni venkos iam, do venkos ĝuste pro nia lingvo, taŭga por ĉiu kaj ĉio – ne pro filozofio, kulturo, kantado, ktp. Mi forte kredas, ke ju pli da Esperanto-lingvanoj ni havos, des pli proksima estos la Fina Venko.

Slavik Ivanov (Peterburgo)

* * *

ATS “Interkulturo”

“Ĉeboksarumi” signifas “fari Lingvajn Festivalojn” – tiel iu deĉifris nian urbon kaj karakterizis nian agadon. Do, mi nur povas aldoni, ke ĉeboksarumi signifas ne nur fari Lingvajn Festivalojn, Karavanojn, sed ankaŭ – Aktivul-Trejnajn Seminariojn (ATS). Kaj la lasta ATS, kiu okazis la 13-an de majo estis dediĉita al la temo “Interkulturo”.

La temo mem estas tiom granda, ke certe ni ne sukcesis rakonti kaj pridiskuti ĉion, sed ni eĉ ne celis tion. Nia tasko estis komprenigi al niaj klubanoj la ekziston de diversaj kulturoj, pensmanieroj kaj tradicioj en la mondo. Ni provis montri kaj doni negativajn ekzemplojn de monda diversnacieco: miskompreno, diskriminacio; kaj samtempe substreki neprajn pozitivajn momentojn en ekzisto de diverskulturaj landoj.

Ni, organizantoj, mem ankoraŭ ne estas spertuloj en tiu temo, kaj ni multe esperis je kunlaboro kun partoprenantoj dum la seminario. Do ni ne nur prelegis, sed ludis, diskutadis kaj esprimadis nin. Kaj ĉe fino de la seminario ni ĉiuj kune provis komprenigi por ni mem la rolon de Esperanto kaj E-movado en apero de interkulturaj socioj.

En la seminario partoprenis homoj, kiuj ĵus finis E-kurson kaj ankaŭ jam sufiĉe spertaj esperantistoj; do estis interese, dum la seminaria rezultpridiskutado, aŭdi, ke multaj nur dum seminario komprenis la ideon de Esperanto kaj klare ekvidis ĝian rolon en la socio.

Katja Burmisova (Ĉeboksari)

* * *

Kantoj en Kostroma

Sabate, la 26-an de majo en Kostroma pasis Vespero de internacia kanto “Kun kanto tra la mond’!”. La dua tia vespero (la unua okazis pasintjare) kolektis en varma frata etoso la kantistojn de popolaj naciaj kantoj, amatorajn kaj preskaŭ profesiajn, loĝantajn en Kostroma. Sonis kantoj ne nur diverslingvaj, sed ankaŭ diversepokaj kaj diversstilaj: malnovaj popolaj, amatoraj, turistaj, klasikaj, vaste konataj kaj antikvaj, gajaj kaj ŝercaj, seriozaj – pri patrujo ktp, ktp.

Vesperon malfermis KETo (Kostroma E-teamo) kun la kanto “Vivu la stel’!”. Nataŝa kaj Andrej Grigorjevskij subtenis nin el la halo, kantante kun ni. Poste, ĉiam dancemaj kaj

laŭte kantemaj armenoj dancigis la publikon. Juna artisto Milaŝ Lovĉenskij – lernanto de muziklernejo, kolektanto de naciaj popolkantoj kaj vestaĵoj – dum la vespero trifoje eliris sur la scenejon kaj kantis serbe, tatare kaj ukraine. Ĉarmis ĉiujn bela knabino en nacia rusa vestaĵo – Maŝa Maliŝeva. Al ŝi oni aplaŭdegis pro plenumo de rusaj strofetoj (“ĉastuŝkoj”). Nikolaj Senĉenko, studento de ŝtata universitato, kantis “Yesterday” angle kaj la plej konatan kanton de kostromaj turistoj – “Flamflava ĉevalo”.

La ĉeestantoj ĥore kunkantis kun belorusoj, kies nacian antaŭparolon sentraduke ĉiu komprenis. Unu el la belorusoj alvenis en Kostroma tiutage (li estas direktoro de KGS-teamo el Novosibirsk) kaj kun sia frato plenumis ŝercan kanton ruslingve kun franca prononco – la plej gaja momento de la vespero. Profesia muzikanto Andrej Dorogov – plenumanto de kantoj en 19 lingvoj, malgraŭ sia malsano venis kaj klasike gitarludis kantante portugale kaj france. Dum sonoj de “Guantanamera” ne ĉiu povis resti surseĝe.

Laŭ konsilo de Garik Kokolija ni, lokaj e-istoj, kantante “Mia amatin’” dum lasta refreno miksis rusajn kaj esperantajn liniojn, kaj la halo vere vigliĝis, aŭdinte konatajn vortojn.

Fine armenoj prezentis novan kanton pri Kostroma, kiu plaĉis al ĉiuj. Samkiel pasintjare, la vespero finiĝis per amasa dancado laŭ iniciato de armenoj, kiuj verŝajne longe dancus, se ni ne petus ilin halti. Rusoj, armenoj, belorusoj, serbo kune dancis inter seĝoj, sur scenejo, forte piedbruante kaj ridante. Sekvatage mi eksciis ke pro la bruo al kinejo eĉ venis milicistoj!

Anoj de la E-teamo nun pripensas kiel plibonigi la vesperon. Eble aŭtune ĝi transformiĝos al lingva festivalo?

KETo, Aleksej Kuznecov, retpoŝto <ka2pink@iname.com>

Dek plej oftaj eraroj dum informado pri Esperanto:

1. Diri ke Esperanto estas lingvo universala anstataŭ lingvo INTERnacia. Aŭ ne atentigi pri tiu diferenco.
2. Paroli pri problemo “de la plurlingveco” anstataŭ “de la lingva baro”.
3. Troa persona kulto de Zamenhof: Majstro, skulptaĵoj, disdonado de fotoj ktp...
4. Atakemaj aŭ altrudemaj sloganoj. Ekzemple: “Dua lingvo por ĈIUJ”.
5. Uzo de politikecaj aŭ religiecaj simboloj: verda stelo, himno, flago...
6. Uzo de politikecaj vortoj: -ist-, movado, propagando, samideano, fina venko, -ista junularo.
7. Uzi la x-metodon por skribi ekzemplajn frazojn.
8. Troigi.
9. Neglekto de la ekstera aspekto de la informanto.
10. Nomi informadon/varbadon pri Esperanto “propagando”.

Thierri SALOMON (prenita el <http://internacialingvo.ini.hu>)

Kio estas laborbrigadoj

Se vi ne ŝatas sidi dum varmaj someraj tagoj hejme, se vi ne komprenas kiel eblas dum horoj kuŝi ĉe la maro, se vi ŝatus havi multe da amikoj el diversaj landoj, do se vi ŝatus aktive pasigi tempon – tiu informo estas por vi! Venu kaj ĝuu laborbrigadojn. Laborbrigado estas formo de aranĝo simila iom al niaj esperantistaj tendaroj, sed pli aktiva kaj pli utila. Volontuloj el diversaj landoj kolektiĝas en unu loko kaj tie faras socigravajn aferojn: foje pri ekologio, foje pri kulturo, foje pri edukado. La aranĝo daŭras maksimume du semajnojn, loĝadon kaj manĝadon proponas loka organizo, anstataŭ salajro vi ricevas bonajn impresojn. Tiuj laborbrigadoj okazas en multaj-multaj landoj kaj en diversaj sezonoj. Ankaŭ ekzistas ebleco volontuli longan tempon (ekzemple TEJO-volontulo). Por akiri pli da informo bonvolu kontakti Torun <torun@barnen.nu> aŭ TEJO-oficejon <tejo-oficejo@esperanto.org>.

Ekzistas kaj Esperantistaj laborbrigadoj kaj krokodilaj, sed ĉiuj ili estas internaciaj. Renkontiĝu laborante!

Novaĵo el Nepalo

Nepalo ekhavis propran junularan organizon. Ĝi nomiĝas "Nepala Esperantista Junulara Organizo" (NEJO). Nun la komitatanoj de NEJO laboras pri la oficiala regularo de la organizo kaj ttt-hejmpaĝo de la 4-a Internacia Himalaja Renkontiĝo (IHR), kiu okazos en la jaro 2002. NEJO petas ĉiujn geamikojn subteni la novan organizon kaj trovi vojon por kunlaboro kun ĝi. Prezidanto de NEJO: Ramkrishna Subedi: <rksubedi@hotmail.com>.

Amerika Junularo: Estonteco Brila kaj Bela!!!

La lando de la Naŭatla lingvo, Meksikio, malkaŝis siajn sekretojn antaŭ la granda scivolemo de la amerikaj gejunuloj kiuj gaje partoprenis en la 5-a Tutamerika Kongreso de Esperanto (TAKE), kun la temo "Ameriko: Unu kontinento, Diversaj Historioj".

Vladka Chvátalová, Ĝenerala Sekretario de TEJO, estis unu inter la gravuloj partoprenintaj ĉi tiun ankaŭ gravegan kongreson, dum kiu estis multege da diskutoj pri la estonteco de Esperanto en la kontinento kaj pri la graveco de la junularaj aferoj. La diskutoj montris ke en Ameriko estas multaj brilaj junuloj kiuj laboras kaj laboros por Esperanto.

Brile partoprenis Amanda Higlej, usonanino, kiu vere spertis la Pasportan Servon, vojaĝante dum plio ol jaro tra Europo, kaj kiu nun prelegas en diversaj universitatoj de Usono kaj Kanado pri sia sperto kaj uzas siajn prelegojn kiel ilon por vigligi la junularan movadon en Nordameriko. Dum la kongreso ŝi gvidis ege interesan diskut-sesion pri la instruado aŭ misinstruado de la Amerika historio en la tuta kontinento, kiu estis unu el la plej interesaj aktivaĵoj de la kongreso. Inter la diversaj punktoj diskutitaj dum la kunsidoj estis Amikoj tra Ameriko, la ankoraŭ nur reta dissendolisto kiu celas kunigi en unu organizon la junularon de la tuta Ameriko por kunlabori: por, pro kaj per Esperanto. Estas rimarkinde ke preskaŭ ĉiuj el la partoprenintaj gejunuloj estas aktivaj membroj de Amikoj tra Ameriko. Grava kontribuanto al la diversaj junularaj kunsidoj kaj aferoj estis Atilio Orellana, kiu multege helpis al la diversaj partoprenantoj kaj kiu multe zorgas pri la junularaj aferoj en Ameriko.

Sed ne ĉio estis seriozaj diskutoj, tute ne... kie estas amerikaj gejunuloj ĉiam estas festo oni diras... kaj dum la kongreso tio tute veris, multo da gajeco, kantado, dancado, promenado tra la urbo, kaj grimpado sur la piramidojn amuzis la gejunulojn.

Majrim Karolina Sandoval Duran (el <landa-agado@yahoogroups.com>)

IJK 2001: informoj el la organiza teamo

La Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazos en Strasburgo (Francio), 29.07-05.08.2001. Ĝis la fino de aprilo aliĝis 266 homoj, el kiuj 236 havas retadreson kaj tiel abonas la ĵus kreitan dissendoliston. Pri la programo – jam eblas anonci prelegojn de Claude PIRON kaj Alain LAUFENBURGER (lingvisto el Japanio). Tiuj du prelegantoj ankaŭ proponos dumnoktajn diskutrondojn. La retpaĝaro de la IJK <http://purl.org/net/ijk2001/> estas jam 25-lingva. Al la IJK estos dediĉita stampo, uzota en la poŝtoficejo de la strasburga stacidomo ĝis la 4-a de aŭgusto. ***Alain FAGOT*** <AFagot@esperanto.org>, kunprezidanto de la Loka Kongresa Komitato

Pasporta Servo (PS) – pasvorto de internacia turismo!

Karaj legantoj. Inter la ricevitaj de mi leteroj al la redaktoro de "REJM-info" min entuziasmigis la letero de Anatolo Gonĉarov. Interalie li proponis pli vaste rakonti pri diversaj

utilaj flankoj de Esperanto, ekzemple pri PS. Mi tuj konsentis kun li, ke PS vere riĉigas eblojn de Esperanto-turismo kaj tuj dissendis leterojn al miaj konatoj kun peto rakonti pri uzado de PS. Jam venas respondoj. Espereble gajaj impresoj kiujn ni publikigos en REGo instigos vin membriĝi al PS (tio estas tute senpaga!). Ĝuu ni la unuajn rakontojn.

Kiam mi ekhavis lokon, kie mi povis facile akcepti gastojn, mi tuj iĝis membro de Pasporta Servo (PS). Kaj, samkiel ĉiuj ceteraj gastigantoj (homoj, proponintaj siajn loĝejojn por gastado de esperantistoj), mi ricevis mian propran ekzempleron de "Pasporta Servo".

Ĝi estas libro kun pluregaj adresoj de esperantistoj el la tuta mondo, kie estas prezentitaj iliaj nomoj, adresoj, mapoj, kondiĉoj de akcepto de gastoj (kiel, kiom da homoj, por kiom da tagoj, kion eble kunhavi).

Mi povis ekde tiam akcepti ajnan esperantiston, kiu estas ano de PS, kaj kiu kontaktis min por demandi pri la gastadebleco kaj interkonsenti pri la datoj. Kaj ankaŭ mi povis kun tiu ĉi listo vojaĝi tra la tuta mondo kaj tute senpage gasti ĉe aliaj esperantistoj, kies adresoj troviĝis en la libreto.

Mi plurfoje havis eblon helpi al gejunuloj de diversaj landoj loĝiĝi al Moskvaj (kaj ne nur) geamikoj. Kaj eĉ unu fojon mem gastigis.

Estis tri geknaboj el Pollando, kiuj unu tagon kontaktis min telefone (aŭ rete?). Ni interkonsentis pri la datoj. Kaj jen, iutage, mi aŭdas sonoron ĉe la pordo kaj vidas polan Esperantan paron kun sia amiko (kiu ne parolis E-on, sed iom babilis ruse, kaj, ĝenerale, estis tre ĉarma knabo).

Amanda Higley (el Usono) estas konata por multaj eŭropanoj, ja ŝi pasigis 16 monatojn en la "olda kontinento" travagante ĝin per Pasporta Servo. Ĉe <http://home.wxs.nl/~lide/ps/ps_aventuro1999.htm> troviĝas ŝia raporto pri tiu aventurplena vojaĝo. Post la reveno ŝi faras prelegvojaĝon tra Usonaj universitatoj per sia rakonto.

Ili gastis ĉe mi dufoje: 4 tagojn, poste foriris al Apudmoskvo kaj ien ankoraŭ, kaj poste ankoraŭ 2 tagojn. Ili venis speciale por vidi ortodoksajn preĝejojn kaj aliajn similajn antikvajn arkitekturaĵojn.

Tage ili promenis al diversaj tiaj lokoj (se mi ne laboris, mi plezure estis kun ili, kio ankaŭ plaĉis al ili), vespere ili legis pole diversajn historiajn dokumentojn pri kristanigo de Rusio, aŭ ni babiladis Esperante... Al mi ege plaĉis gastigi (precipe – ilin!)!

Se vi ankoraŭ ne estas gastiganto de PS, aŭ, almenaŭ, aktiva gastanto – rapidu iĝi, al vi ege plaĉos! Kaj al mi restas bedaŭri, ke mi nun ne povas gastigi ankoraŭ iun...

Oĉjo Dadaev (Moskvo)

* * *

Ĉi-vintre mi kun amiko revenadis de ISo (Kukshaven) kaj decidis halti ĉe Stefani Haniŝ, en Orienta Berlino. Stefani estas bonega homo. Ni telefonis al ŝi preskaŭ lastan tagon de la aranĝo (ankaŭ ŝi partoprenis, sed forveturis pli frue; interalie ni ne sukcesis konatiĝi dum ISo) kaj demandis – ĉu eblas veni? Kaj ricevis respondon – nu certe venu! Pri Stefani estis krokodila surprizo – Stefani ŝatas Rusion, la rusan lingvon kaj iam eĉ loĝis en Rusio. Ni venis al malgranda studenta loĝejo de Stefani. Ĉio tie estis ĉarma kaj komforta: surplanka "orienta" vespermanĝo, bildetoj sur muroj, bonkvalita muziko, dormoĉambro en la dua etaĝo. Laŭ mi – ideala loĝejo por studento kaj kompanio. Pri la anĝela karaktero de la mastrino eblas rakonti longe. Kiam ni venis jam ĉe ŝi loĝis du rusiaj esperantisoj (ankaŭ de ISo) kaj post ni venis ankoraŭ du! Sed Stefani nur maltrankviliĝis – ĉu sufiĉe varmas por ni, ĉu ni ne estas malsataj, ktp? Ŝi eĉ donacis al mia amiko kompaktdiskon, kiu plaĉis al li! Vespere ŝi kune kun ni vagadis tra Berlino kaj montris vidindaĵojn. Kaj proponis al ni resti pli longe ĉe ŝi. Laŭ lerneja sistemo mi donus 5 poentojn por la manĝaĵo, 5 por la noktado kaj 5 por la kultura programo!

Kuĥtina Nika (Moskvo)

Eksciu, ke...

MEMBROSTATISTIKO DE UEA EN 2000

Post 13-jara periodo kun ĉiujare pli ol 7000 individuaj membroj de UEA, en 2000 ilia nombro restis klare sub tiu limo. La nombro de 6580 individuaj membroj estas je 495 (7 %) sub tiu en 1999, kiam ĝi ankoraŭ estis 7075. Kreskis siavice, unuafoje de post 1987, la nombro de aligitaj membroj, t.e. tiuj anoj de la aliĝintaj landaj asocioj kiuj ne membras individue en UEA. En 1999 ili estis 12096; en 2000 je 426 pli multaj, nome 12522. Tio preskaŭ kompensis la perdon de individuaj membroj, tiel ke la tuta membraro de UEA malkreskis nur per 69, t.e. de 19171 en 1999 al 19102 en 2000. Pro la konsiderinde malpli granda UK en 2000 ol en 1999, malkreskis ĉefe la kategorio Membro kun Jarlibro, kiun forte influas la nombro de la aliĝoj al UK. La perdo en tiu kategorio estis 335 (16,9 %). Iom falis (130, t.e. 3,6 %) la kategorio Membro-Abonanto, cetere parte pro la plimultiĝo de dumvivaj membroj. En 2000 aliĝis la rekorda nombro de 34 novaj dumvivaj membroj, sed forpasoj limigis la netan kreskon en tiu kategorio al 5.

Plej multe da individuaj membroj perdis Brazilo (-58) kaj Usono (-37), dum ili pleje plimultiĝis en la kongreslando Israelo (+16) kaj Hungario (+14). El ĉiuj individuaj membroj 489 aliĝis unuafoje en 2000. El ili 182 estis junaj, t.e. 30% de la tuta individua membraro de TEJO. En 17 landoj (20 en 1999) estis almenaŭ 100 individuaj membroj: Francio 651 (falo de 35), Germanio 572 (-15), Brazilo 493 (-58), Japanio 389 (-20), Usono 352 (-37), Nederlando 337 (-12), Svedio 238 (-17), Italio 223 (-30), Finnlando 222 (-12), Britio 207 (-23), Ĉinio 186 (-1), Belgio 164 (-21), Hispanio 157 (-33), Pollando 138 (-12), Hungario 136 (+14), Rusio 135 (-35) kaj Svislando 128 (-6). Sub la limon de 100 falis Danio 89 (-19), Ĉeĥio 88 (-14) kaj Kroatio 88 (-21). La individuaj membroj malmultiĝis malgraŭ tio, ke jam de tri jaroj ne okazis ĝenerala kotiz-plialtigo. Kaze de Japanio kaj Usono la kotizoj eĉ malaltiĝis sekve de la plivaloriĝo de iliaj valutoj kontrau eŭro, sed ankaŭ tie la membraro malkreskis.

Inter la aligitaj membroj plej rimarkinde kreskis Brazilo (+642) kaj Francio (+230). La plej grandan falon registris Germanio (-411) kaj Svedio (-245). La revuo “Esperanto” havis en diversaj kategorioj 4729 pagintajn ricevantojn, t.e. je 161 (3,3 %) malpli ol en 1999 (4890). Pli forte perdis “Kontakto”, kies paginta ricevantaro falis de 1558 en 1999 al 1246 en 2000 (-312, t.e. 20 %).

LA FORTALEZA UK TRAKTOS EKOLOGIAN TURISMON

La Estraro de UEA decidis dediĉi la 87-an Universalan Kongreson de Esperanto, okazontan de la 3-a ĝis la 8-a de aŭgusto 2002 en Fortalezo, Brazilo, al ekologia turismo. La jaro 2002 estos Internacia Jaro de Ekologia Turismo, tiel ke ankaŭ en tiu jaro la UK daŭrigos la tradicion kontribui al la aktuala tema jaro aŭ jardeko de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko.

La vortumo de la Fortaleza temo tekstas “Diverseco: ŝanco, ne minaco”. Per tio la Estraro de UEA akcentas la neceson kompreni la ekologian turismon pli vaste ol nur en rilato al la naturo. Same necesa kiel konservo de la natura diverseco estas tiu de kultura diverseco. Fundamenta aspekto de la kultura diverseco estas la diverseco de lingvoj. (CO de UEA)



KURTE

Naturkuracado 2000 – senpage en la reto. <http://www.mz-verlag.de/INA/Publikationen/INA_jarlibro_2000_online.pdf> – ĉe tiu retadreso estas senpage legebla kiel elektronika libro la organo de INA (Internacia Naturkuraca Asocio) sub la titolo “Naturkuracado 2000”. Membreco en INA estas utila por ĉiu, kiu interesiĝas pri sano, precipe kompreneble por naturkuracistoj aŭ medicinistoj. La hejmpaĝo de INA estas <http://www.esp-ina.com>. ***(H.Schicke)***

Amnestio Internacia en Esperanto. Danke al Vincent Charlot ekde nun eblas legi aktualajn komunikojn de Amnestio Internacia en la Internacia Lingvo Esperanto. La tekstoj estas libere uzeblaj, kaj vi povas aperigi ilin en viaj revuoj aŭ informiloj. Bv. viziti <http://users.skynet.be/bs939002/amnestio.html> ***(ret-info)***

“Eŭropa Bulteno”, la retbulteno de EEU (Eŭropa Esperanto-Unio) estas retpoŝte sendata senpage en formato “sola teksto” al ĉiu kiu petas ĝin al la adreso <u.broccatelli@tiscalinet.it>. Krome ĝi estas sendata en papera versio al ĉiuj kiuj kontribuas al EEU per mondonaco de almenaŭ 20 eŭroj jare. Nun ĝi estas ankaŭ legebla en formato PDF en la TTT-ejo de EEU <http://lingvo.org/eo.html>. (***Umberto Broccatelli,*** Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio)

60-jara jubileo! La 12-an de aprilo 1941, dum la solenaĵo de la 1-a Argentina Kongreso de E-o estis fondita AEL, **Argentina Esperanto-Ligo.** La Unuan Kongreson kunvokis grupo de gravaj s-anoj argentinaj kaj eksterlandanoj, kiuj okaze de la mondmilito devis longe restadi en la lando (i.a. Tibor Sekelj). AEL aliĝis al UEA en 1946. ***(argent-reto)***

Ankaŭ EŜLI – **Esperanta Ŝak-Ligo Internacia ekuzis Interreton** por kunagordi sian agadon. Elektronika formato (win-word) de la revuo Esperanta Ŝako estas dissendata per reto. Interesiĝantoj ricevi ĝin (kaj iĝi membro de EŜLI) kontaktu: Arvo Reede (EE-90506 Haapsalu, Opetaja 27, Estonio), retadreso <arvo.reede@edela.customs.ee>.

ROK-gazet’ bezonas novan redaktoron! ROK-gazet’, la Esperanta muzik-magazino estas unu el la plej prestiĝaj kaj bonkvalitaj E-revuoj, eldonata de la societo “Eurokka”. Por daŭrigi la eldonadon nun estas serĉata nova ĉefredaktoro (ankaŭ ino). La sekva numero (10-a) povos aperi nur se oni jam trovis tiun novan, gravan personon. Pliaj informoj kaj kontaktoj ĉe: Rok-gazet’, FR-31450 Donneville, Francio; eblas kontakti rete <eurokka@esperanto.org>.

Ĵus aperis **Angla-Esperanta Medicina Terminaro** de Yamazoe Saburoo. La verko estas 720-paĝa dika libro enhavanta pli ol 28000 anglajn medicinajn terminojn kun ilia traduko al Esperanto. La libro mencias, ĉu la vorto estas PIV-a, sed kompreneble listigas milojn da vortoj, kiuj ankoraŭ ne ekzistas en PIV. La aŭtoro estas doktoro pri medicino kaj pri biokemio. Eldonis la verkon Umea Shinoda Kuracejo en Kraków, Pollando. ***(ret-info)***

La Esperanto-Klubo “Juneco” en Vilnius okazigis tradician, jam la **35-an Boatadon** en la naciparka lagaro de Litovio. En ĝi partoprenis dudek esperantistoj kaj ili remadis tri tagojn tra dek lagoj. Ilian interesan vivon fotraportas Choe Taesok en http://member.hitel.net/~chtaesok/boatado/boatado_1.html/. Tie troviĝas entute 52 fotoj kun klarigoj. ***(ret-info)***

LIBRA REVUO

4387 esperantaĵoj en unu loko!

La impona nombro de 4387 titoloj troviĝas en la nova 189-paĝa katalogo de la Libroservo de UEA. Pli ol 4100 el ili estas libroj, dum la resto konsistas el diskoj, kasedoj, vidbendoj, insignoj k.a. varoj.

La katalogo, titolita simple "Esperanto-katalogo" kaj eldonita en 7500 ekzempleroj, havas 40% pli da titoloj ol la antaŭa, aperinta en 1994, kiu havis 3150 erojn. Ĝi ne estas nura prezlisto, sed la varoj estas koncize priskribitaj. La katalogo estas dividita en 32 fakojn. Ĝian uzon plifaciligas ankaŭ indekso de la aŭtoroj, entute 375, kiuj estas reprezentataj per pluraj titoloj. Al la informa valoro kontribuas ankaŭ multaj reklamoj de Esperanto-eldonejoj. Plenkolora kovrila foto pri la libroserva butiko en la Centra Oficejo faras el la katalogo tre allogan eldonaĵon, kiu certe ne povos manki en iu ajn ekspozicio pri Esperanto. Apud la Jarlibro de UEA kaj la adresaro de Pasporta Servo de TEJO ĝi montras la vivantecon de Esperanto kaj ĝia movado.

La katalogo estas sendita senpage al la dumvivaj membroj kaj delegitoj de UEA, al la klientoj de la Libroservo kaj al la Membroj-Abonantoj en pagipovaj landoj. Poste ĝin ricevos ankaŭ tiuj, kiuj ankoraŭ ĉi-jare aliĝos al UEA en la kategorio Membro-Abonanto, kaj la novaj klientoj. Eblas ankaŭ aĉeti la katalogon. Ĝia prezo estas 4,5 eŭroj (plus afranko). Se oni samtempe aĉetas minimume tri ekzemplerojn, la prezo estas 3 eŭroj. Tiuj kiuj pagas la plenan prezon de 4,50 eŭroj, rericevos ĝin lige kun sia unua mendo ĉe la Libroservo de UEA.

CO de UEA

UEA disdonos por la kvina fojo subvenciojn al Esperanto-bibliotekoj el la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen. Pasintjare 15 bibliotekoj povis pliriĉigi siajn kolektojn je la suma valoro de 1800 eŭroj. Povas peti la subvencion Esperanto-bibliotekoj, kiuj ne estas subtenataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. La subvencipetojn devas akompani listo de dezirataj libroj, ordigita laŭ prefero. Diskoj, kasedoj, vidbendoj k.a. nelibraj varoj ne estas subvencieblaj. Se la peto estos akceptita, oni ricevos librojn por la valoro de la subvencio. La subvencipetoj devas atingi la Centran Oficejon de UEA ĝis la 15-a de oktobro 2001. *(ret-info)*

E.Groĵan-Mopen kaj Rusa-Esperanta vortaro de Bokarev

Dum longa tempo mi aŭdas plendojn pri grandega diferenco inter Rusa-Esperanta kaj Esperanta-Rusa vortaroj de E.A.Bokarev. Ĉar la diferenco estas ne nura kaprico de la vortaristo, mi prenas la taskon klarigi al komencantoj la radikojn de la kialoj.

La radikoj trapenetras la tutan historion de E-o kaj por plena kompreno ni devas pense reveni al la unuaj jardekoj de E-o.

Kiel vi memoras, La Unua libro enhavis nur proksimume 920 radikojn. Eĉ tiu malgranda kvanto de radikoj sufiĉis por lanĉi E-literaturon. Tamen la lingvo kreskis kaj kvanto de la radikoj kreskis. La Universala Vortaro (eldonita en aŭgusto 1893) jam enhavis aldone al La Unua Libro proksimume 1710 novajn radikojn. La radikaro estis tradukita al kvin lingvoj: franca, angla, germana, rusa kaj pola. Poste aperis vortaroj, kiuj ne plu uzis iujn pontlingvojn. Ni povas ekz. nomi Vortaron de Esperanto de Kabe (eldonita en 1910). En la

vortaro ĉiu E-vorto estis klarigita per E-o kun uzo de iuj ekzemploj, plej ofte literaturaj. Tiu vortaro havis lingvonormigan celon. Havante la vortaron, esperantistoj ne plu bezonis scii iujn fremdlingvojn krom E-o. Kaj la senco de ĉiu vorto jam estis same klara por ĉiulingva esperantisto. Post tiu jaro ĉiu vortaro grava por esperantologio, kaj ĝenerale Esperanto, estis Esperanto-Esperanta.

Sed esperantologio estas ne nur scienco pri E-o, sed ankaŭ pri kontaktoj de E-o kaj naciaj lingvoj. En la sama jaro 1910 kaj en la sama urbo Parizo estis eldonita Dictionnaire complet Esperanto-Français (Plena Esperanto-franca vortaro). E.Groĵan-Mopen (E.Grosjean-Maupin), la aŭtoro de la vortaro, en antaŭparolo diris, ke taskoj de E-franca kaj Franca-Esperanta vortaroj estas tute malsamaj: Franca-Esperanta vortaro devas esti firma kaj klara rimedo por tiu, kiu lernas aŭ uzas E-on, ĝi devas esti normiga, rekomendanta vorton kaj ĝian uzon; E-franca vortaro devas esti uzata por kompreni tekstojn, ĝi devas esti priskriba, registranta realan staton de E-o kaj ties literaturo. E.Groĵan-Mopen uzis du formojn de indikiloj. La unua estis uzata por indiki vortojn kiuj ne estas rekomendataj por uzi en ĉiutaga vivo. Tiuj estas specialaj vortoj, sciencaj terminoj. La dua estis uzata por indiki vortojn, kies neceso estas malklara kaj kies uzo estas dubinda. Grava atingo de E.Groĵan-Mopen estas tio, ke li ne timis prezenti la lastajn vortojn al esperantistoj, konsciante, ke la esperantistaro mem decidos, kiujn vortojn indas uzi. La sistemo de prezento de novaj, iam eĉ dubindaj, vortoj estis grava paŝo por esperantologio kaj ĝi estis uzata (kun indikilsistemo) en ĉiuj ĉefaj E-vortaroj (PV, PIV).

Viro vespere eliris el oficejo kaj atingis taksion ekzakte tiam. Dum li eniras la taksion la ŝoforo rimarkis: “Vi havas perfektan senson de ĝustatempo. Precize kiel Vincento.”
“Kiel kiu?”
“Vincento Brilo. Jen estis ulo kiu nepre faris ĉion tute ĝuste! Kiel ĵus okazis, pri mi kaj mia taksio, ekzakte kiam vi bezonis min. Tiel okazus pri Vincento ĉiuokaze,” respondis la taksiisto.
“Sed neniu estas tiom perfekta. Ĉiu foje eraras,” oponis la pasaĝero.
“Ne pri Vincento. Li estis bonega atleto. Li kapablis esti tenisa majstro se li elektis fari tion. Li ludis golfon kiel profesia golfisto. Li kantis kiel Caruso aŭ Michael Jackson – laŭ sia humoro – kaj li dancis kiel Novjorka danca stelo.”
“Li estis multe talenthava viro, ĉu?”, enketis la pasaĝero.
“Kredu! Li havis fenomenan memoron. Li memoris senerare la naskiĝtagojn de ĉiuj. Li sciis ĉion pri vinoj, manĝaĵoj, kiun forkon uzi taŭge, cetere. Li povis ripari ion ajn, kontraŭe al mi, kiu ne kapablas eĉ maldifekti fandodraton. Mi provus ripari fandodraton – tiam la najbaroj kaj ni ne havus lumojn!”, diris la taksiisto.
“Kompreneble do, ke vi memoras lin tiel klare,” respondas la pasaĝero.
“Fakte mi neniam renkontis tiun ulon.”
“Nu, kiel vi konas lin tiel bone?”
Respondis la taksiisto: “Mi edziĝis al lia vidvino.”
(esperanto-anekdot)

Esperantistaro renkontis la vortarojn malsame. Esperantistoj, grupiĝintaj ĉirkaŭ “La Revuo” (eldonita en Parizo en 1906-1914) kaj ĝia direktoro K.Burle (C.Bourlet), alte taksis la vortaron. Ili opiniis, ke E-on necesas riĉigi per vortoj prenitaj el aliaj lingvoj (ankaŭ el Ido). Ili ricevis la nomon “neologistoj”. Aliaj, “puristoj”, opiniis, ke la Fundamento jam havas ĉion necesan por plua vivo de E-o. Ilia centro estis “Lingvo internacia” (Parizo, 1905-1920) gvidata de T.Kar (Th.Cart). Ili provis bremsi la procezon de penetro de novaj vortoj en la lingvon. Ili akre kritikis la vortaron de E.Groĵan-Mopen. Kaj neologistoj kaj puristoj estis pravaj. Dank’ al la unuaj ni havas riĉegan lingvon, dank’ al la duaj la lingvon eblas kompreni. Bataloj inter neologistoj kaj puristoj estis, estas kaj estos ĉiam.

Prava estis ankaŭ E.Groĵan-Mopen, kiu poste redaktis Plenan Vortaron de Esperanto

(PV), surbaze de kiu poste estis farita Plena Ilustrita Vortaro (PIV).

Per samaj principoj sin gvidis E.A.Bokarev, kiam li faris siajn vortarojn. Kaj ĉiu el ni povas konfirmi, ke la Rusa-Esperanta vortaro estas tre riĉa per rusaj vortoj kaj estas utilega por esperantigi rusajn frazojn. Kiam mi lernis E-on ĝi multe helpis al mi. Same bona estas E-rusa vortaro, kiam ni provas traduki Esperantajn tekstojn al la rusa.

Mi esperas, ke post tralego de ĉi supraĵo ni iom pli estimos Rusa-Esperantan kaj Esperanta-rusan vortarojn de E.A.Bokarev.

P.Fiŝo (Moskvo)

Por la artikolo estis uzataj la libroj:

PIV, la 3-a eldono. SAT, 1987
Zamenhof L.L. Fundamento de Esperanto, la 10-a eldono. 1991
Gvidlibro por supera ekzameno, redaktita de A.Pechan. 1979
Кузнецов С.Н. Теоретические основы интерлингвистики. 1987

"Jurgen" + "Trans la Spegulo" = novaj libroj de "Sezonoj"

Usona verkisto James Branch Cabell (1879-1958) publikigis pli ol 50 romanojn, kaj "Jurgen" (1919) estas la plej konata el ili. Ĝian sukceson akcelis tio, ke en Novjorka juĝejo ĝi estis akuzita pri maldeco kaj obsceno. Sed ne serĉu tiujn en la libro!.. Jurgen estas lombardisto en imagita lando, iama poeto, kiu regajnas sian junecon, retenante la saĝon kaj sperton de sia matura aĝo. Serĉante sian forsorĉitan edzinon, Jurgen travojaĝas fantaziajn kaj legendajn teritoriojn, inkluzive de la kristanaj Infero kaj Paradizo, prosperante ĉe belaj virinoj (ekzemple, Helena de Trojo) kaj ĉiam plialtiĝante range, ĝis fine li renkontas la ĉielpotencan Koŝĉej (kiu "faris ĉiujn aferojn tiaj, kiaj ili estas") kaj petas, kun interesaj sekvoj, redonon de la edzino. La ĉefverkon de Cabell majstre tradukis William Auld. "Sezonoj" (Jekaterinburg) eldonis ĝin kiel la dekan volumon en la serio "Mondliteraturo". Interalie, "Jurgen" estas la plej ŝatata libro de Auld.

La Esperanta traduko de "Alico en Mirlando" de Lewis Carroll, eldonita en aŭgusto 1999 estis elĉerpita jam fine de 2000. En junio 2001 "Sezonoj" (Ruslando) eldonis la duan libron de Carroll pri Alico – "Trans la Spegulo kaj kion Alico trovis tie". Same kiel la unuan libron pri Alico ĝin tradukis Donald Broadribb. "Trans la Spegulo" aperis kiel la 11-a volumo en la populara libroserio "Mondliteraturo". La libro havas belan plenkoloran kovrilon de Maŝa Baĵenova kaj ilustraĵojn de John Tenniel interne. Cetere, "Trans la Spegulo" markas etan jubileon; ĝi estas la 75-a libro, kuneldonita de Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov.

Ambaŭ libroj estas mendeblaj ĉe la eldonejo poŝte (Галина Романовна Горецкая, 620014, Екатеринбург-14, аб. ящик 162) aŭ rete <sezonoj@mail.ru>. La 240-paĝa libro de Cabell por la esperantistoj en Ruslando kostas 59 rubloj (plus sendokosto 7 rubloj); la 128-paĝa libro de Carroll – 29 rubloj.

Halina Gorecka (Jekaterinburg)

"Danteskaj intineroj"

verkita de Vittorio Russo, tradukita de Nicolino Rossi
eldonita de la Napola E-Asocio en 2001

Tiom interplektiĝis ĉiuj artoj en nia moderna mondo! Jen ankaŭ pri tiu ĉi libro mi komence havis strangan impreson – kiom nekutima ĝi estas por la biografiaĵo! Ja temas pri la biografio de la granda Dante Alighieri, itala poeto, kiu en la 13-a jarcento faris por la italaj literaturo kaj lingvo tion, kion en la 19-a faris por la rusa Puŝkin. Sed kiam mi tralegis en la prefaco, ke samtempe tiu verko estis uzata ankaŭ kiel akompana materialo por videofilmo

pri la poeto, la enigmeco dissolviĝis. Jes, tiajn formojn mi abunde vidis en la televido.

... (rakontanta voĉo): "Danto naskiĝis en Florenco en 1265 en familio de eta kaj freŝdata nobeleco urba..."

… (deklamanta voĉo): "Estis nia Poeto de meza staturo, kaj li havis la vizaĝon longa, kaj la nazon agleca, la vangostojn grandaj kaj malsupran lipon tiom antaŭŝovita, kiu sufiĉe la supran devancis..."



Iĝis komprenebla ankaŭ la legend-lega stilo kaj ŝiritaj "poeziaj" parolturnoj. Jes, tio estis ne scienca, sed populara prezento pri la Poeto kaj liaj kreaĵoj, intermiksita kun longaj fragmentoj el liaj propraj verkoj, ilustrantajn liajn viveventojn, emociojn kaj vidpunktojn. Tiuj estas prenitaj el la klasikaj tradukoj de Kálmán Kalocsay kaj de itala E-tradukisto Enrico Dondi.

Dank' al tio la libro legiĝas kiel vera aŭtobiografio el sub la plumo de la granda poeto mem. Aŭ kiel ankoraŭ unu – ĝis nun nekonata poezia kreaĵo de la aŭtoro, kun mallongaj parentezaj klarigoj pri la epoko kaj la vivsituacioj de Dante.

La forte sentebla italeco de tiuj komentoj ne malbonigas la pozitivan impreson, sed aldonas ian specifan italan akcenton al la subkoncie sonantaj vortoj. Kvazaŭ iu itala voĉo italecritme kaj italecerare akompanas la nevidatan spektaĵon.

Andrej Grigorjevskij (Ivanovo)

A.Ŝejpak. Hidromekaniko kaj varminterŝanĝo en Esperanto

(resumo de lekcioj), eld. Редакционно-издательский центр МГИУ, 1999, 35 p.

Se oni demandus min, kiun libron mi opinias la plej grava el la eldonitaj en Rusio dum lastaj jaroj, mi post nelonga pensado nomus "Hidromekaniko kaj varminterŝanĝo" far A.Ŝejpak. Multaj ne konsentus kun mi kaj memorigus la serion de Strugackij-fratoj aŭ la ruslingvan Lins-aĵon, aŭ Tolkien-serion. Jes, tuj libroj estas monde gravaj por E-kulturo. Sed malgraŭ ĉio mi nomas la libreton de A.Ŝejpak Libro de la jardeko.

Kial? Ĉar en nia lingvo abundas beletraj, esperantologiaj, historiaj kaj multaj aliaj libroj, sed ili plej parte estas "lirikaj" libroj, tamen libroj "fizikaj" tro malmultas. Oni al mi eĉ ofte diris, ke pro tio E-o ne estas serioza lingvo. Sed jam nun mi povas montri al ili la libron.

"La sistemo de la diferencialaj ekvacioj por mekaniko de fluidaĵoj", "Fundamentoj de hidrostatiko", "Diferencialaj ekvacioj por fluo en la maldika tavolo" – ĉu vi aŭdas subtilan muzikon de teknikaj sciencoj en la nomoj de ĉapitroj de la libro?

Mi revas havi hejme esperantigitajn lernolibrojn pri matematiko, fiziko, kemio, astronomio. Kiucele? Ĉar mi volas klarigi al mia filino ĉiujn nuancojn de la sciencoj en E-o. Ĉar mi volas scii en E-o ĉion, kion mi scias en la rusa. Kial mi scias ruse **бозон, кварк, нуклеотиды, пентод, микропроцессор, валентность** kaj aliajn teknikajn kaj sciencajn vortojn, sed en E-o mi eĉ ne scias la tabelon de kemiaj elementoj? Mi hontas pri tio. Certe mi scias, ke multaj homoj vivas feliĉe nesciante, kio estas Δ-forma alo. Tamen lingvo sen tio ne povas esti feliĉa.

Post apero de "Hidromekaniko kaj varminterŝanĝo en Esperanto (resumo de lekcioj)" far A.Ŝejpak nia lingvo estas pli feliĉa.

Paŭlo Leto (Moskvo)

Kontentiga partopreno en la belartaj konkursoj de UEA

Entute 76 originalajn beletraĵojn kaj 4 infanlibrojn ricevis ĉi-jare la Belartaj Konkursoj de UEA. Pasintjare temis pri respektive 62 kaj 5. Kiel oni jam spertis antaŭe, la partoprenemo malstrikte rilatas al la grandeco de la Universala Kongreso en la koncerna jaro.

La juĝantoj, po tri en ĉiu branĉo, estas nun pesantaj la meritojn de 47 poemoj (pasintjare 40), 16 prozaĵoj (11), 3 teatraĵoj (1), 6 eseoj (4) kaj 4 kantoj (6). Pri la premio Infanlibro de la Jaro konkursas 4 libroj (5) aperintaj pasintjare. Tiu lasta estas la sola branĉo, en kiu konkursas jam eldonitaj verkoj. Ili ankaŭ rajtas esti tradukoj, dum la konkursaĵoj de la aliaj branĉoj devas esti originale verkitaj en Esperanto kaj ne publikigitaj.

En la vidbenda branĉo la limdato ankoraŭ ne pasis. Eblas sendi filmojn por la konkurso ĝis la 1-a de julio. Ilia daŭro devas esti 15 ĝis 60 minutoj.

__Nombro de konkursaĵoj 1995-2001:__

	1995	1996	1997	1998	1999	2000	2001
Poezio	25	50	38	51	52	40	47
Prozo	29	26	21	34	20	11	16
Teatro	6	11	3	6	5	1	3
Eseo	11	8	5	6	7	4	6
Kanto	8	8	6	11	10	6	4
Infanlibro	9	4	2	7	3	5	4
Entute	88	107	75	115	97	67	80

Esperantologia konkurso

Bedaŭrinde respondoj al la unua tasko nemultas. Certe ĝi estis sufiĉe komplika, sed mi esperis, ke niaj "lingvouroj" almenaŭ iom riveliĝos. Ve! Eĉ la lasta, tre simpla, tasko ne trovis abundan respondantaron. Mi esperas, ke la dua tasko aktivigos esperantologian penson en Rusio. Por ne tro ŝarĝi respondontojn mi faras nur unu demandon:

Bonvolu nomi esceptojn de Esperanto.

La respondojn bv sendu aŭ per elektronika poŝto al la adreso de la redakcio kun indiko "Esperantologia konkurso", aŭ per ordinara poŝto al sekva adreso: ***RUS-141078, Moskva regiono, Koroljov, a/k 200, Perepelica Vladimir Alekseeviĉ.***

__La respondoj al la tasko n-ro 1 estas jenaj:__

1) La 1-a linio – "1881", la 3-a – "-n", la 4-a – "-op-", la 5-a – "-in-", la 6-a – "-uj-", la 7-a – "mi". En la tabelo estas prezentitaj kelkaj ŝanĝoj, kiujn Ludoviko Zamenhof fiksis en Esperanto (1887) kompare kun la versio de 1881.

2) 1909 – "-aĉ-", 1919 – "-ism-", 1953 – "-end-". En la tasko estas prezentitaj sufiksoj kaj jaroj de ilia oficialigo far la Akademio de Esperanto kompare kun 1887 (29 sufiksoj).

3) Laŭ Fundamento de Esperanto kazoj estas realigitaj per du rimedoj (laŭ la dua regulo): per finaĵoj kaj per prepozicioj. "Kazoj estas nur du: nominativo kaj akuzativo… La ceteraj kazoj estas esprimataj per helpo de prepozicioj (la genitivo per **de**, la dativo per **al**, la ablativo per **per** aŭ aliaj prepozicioj laŭ la senco)". Tiel al ni klarigas PAG. Sekve ĝenerala kvanto de kazoj estas ne certa. Ni povas certi nur pri la unuaj du kaj aldoni proksimume 33 kazojn.

El respondintoj al la 1-a tasko mi volas aparte gratuli s-ron **Nikolao Neĉajev** el Irkutsk. Liaj respondoj ne ĉiam ĝustis, sed ili estas tre interesaj kaj plenaj de scivolemo. Li ricevas premion: **Plena Vortaro de Esperanto kun suplemento** (PV).

P.Fiŝo (Moskvo)

CERBE KAJ KORE



kompilis Garik Kokolija

DENOVE ...

"Poezio estas krono de la pensado, sed ne azilo por povraj anime"

Karol Irzykowski, pola literaturisto kaj eseisto

"Izoleco sekvigas stagnon, kiu siavice vestas la poezion per pliiĝanta formalismo, dum ju pli intimaj estas la kontaktoj kun la ĉirkaŭmondo des pli libera fariĝas la formo de la poezio"

Baldur Ragnarsson

"Supraĵa ekkono de la enhavo povas konduki nin nur al misa kompreno de la aŭtoro"

prof. d-ro **Jerzy Loth**

En la diskuto, ekflaminta sur la paĝoj de REGo ne estas io eksterordinara, ĉar ĝuste ekssovetaj poemuloj dum longa tempo evitis influon de la plej moderna formo de poezio: "blankaj versoj". Kaj ni povas nur bedaŭri pri la evento. Tamen ni devas diri, ke hodiaŭ klasika poezio ne estas sola, al kiu oni konfidas siajn sentojn kaj emociojn.

Do, ĉi-sube ni parolos pri poezio, kiu ne timas veni al homanimoj kun malarmitaj manoj. Pri poezio, kiu ne bezonas specialajn armilojn: rimon kaj regulan periodecon. Pasintfoje mi prezentis nur miajn emociojn sen faktoj, nun mi prezentos al vi laŭeble pli multe da faktoj.

Venu ni al faktoj. Ekz. konata poeto kaj teatra kritikisto Grigorij Arosev foje rememoris, ke li legis en enciklopedio (ankaŭ en PIV) deĉifron de la vorto "verso", klarigantan, ke verso nepre devas havi aranĝitan silaboordon kaj regulan periodecon. Mi esploris multajn enciklopediojn kaj povas konfesi, ke mi ne fidas al enciklopedioj laŭ kiuj Puŝkin estas nura versisto (ja li estis ankaŭ fama prozisto, eldonisto, tradukisto kaj historiisto) kaj Brodskij malestas tute. Interalie en PIV, laŭ la tria senco, poezio estas "Beleco, elvokforto de la ideoj, bildoj kaj stilo, sendepende de la metrika formo" (substrekita de mi). Mi opinias, ke la terminologia disputo ne klarigas situacion, sed tute male nur komplikas ĝin (rememoru pri neproza "romano" de Puŝkin kaj neversa "poemo" de Gogol). Des pli, ke laŭ mi, terminoj estas iu formo de sintrompo: mi posedas poeziajn terminojn – do mi regas poezion. Sed gravas ne regi – gravas kompreni. Kaj per la akvofalo de terminoj la oponantoj kaŝas nekomprenon. Ili ne komprenas kiel versaĵo povas ekzisti sen rimoj, same kiel gapuloj ĉeestintaj la fajroekzekuton de Bruno ne komprenis kiel la Tero turniĝas ĉirkaŭ la Suno. De alia flanko rimoj certe estas forta armilo de klasika poezio. Sed kontraŭ kiu ĝi armiĝas?

De la alia vidpunkto elpaŝas fama verkisto kaj tradukisto Valentin Melnikov. Li opinias,

ke verki versojn senrime povas ĉiu persono, kiu ne posedas aŭ ne sukcesas rimi. Kaj tio estas iom stranga, ĉar en la konata versokolekto "Moskvaro" ĝuste li prezentis malklasikajn versojn. Unuliniaj poemoj (vi memoras certe: "Ruslanda Esperanto-Asocio – ?.."), prezentitaj de li, estas klare senrima poezio. Samtempe li opinias, ke "seriozaj poetoj zorge poluras siajn verkojn kaj konstante lernas, dum la "avangardaj" preferas uzi la tempon por etosumado." Mi provos praktike montri laboron de la aŭtoroj per ekzemplo de konata versaĵo de pola verkisto Walerian WLODARCZYK "Mio mia":

Mio mia

Patrino, Patrineto,
Patrinjo, Panjo –
Mio mia!
Tera Dio!

"Panjo" – ol mielo pli dolĉa vorto,
Akuŝo daŭranta … oferad' senlima …
Karesa – amata sufero …
Amo super amoj en temp' senfina.

En Ŝi mi naskon prenis,
Vivigis min Ŝi, personecon donis
Reĝe skulptis ecojn miajn.

Dum vivotempestoj Ŝi – ŝipo,
Havena en mia vojaĝo senĉesa,
Soldat' heroege gardadon zorganta.
……………………………………
Infanan amegon akceptu –
de l' etulo via.

Egulino mia (la unua versio de la versaĵo)

Patrino, Patrineto,
Patrinjo, Panjo –
Vi princo de princoj
Eco kaj ego de mio mia

"Patrino" – pli dolĉa vorto ol mielo,
Amego ĉiama … oferad' senfina …
Simple: Amo super la amoj sentempaj.

En ci mi naskiĝis kaj jam de tio
Komenciĝis ensorĉita skulptado de mio mia.

Dum vivotempestoj Ŝi – ŝipo de ŝipegoj
Haveno dum mia vojaĝo senĉesa,
Soldato heroa gardadon zorganta.

…………………………………………
Infanan amegon prenu –
de ereto via.

Ni povas vidi, ke la du poemoj, malgraŭ iu simileco, estas malsamaj. La dua versio estas multe pli sentoza kaj impresa.

"Mio mia! Tera Dio" – sendispute tiuj kvar vortoj estas multe pli profundaj ol la unua varianto "Vi princo de princoj Eco kaj ego de mio mia". Kaj gravas ne diverseco de la esprimoj, sed la interna energio, kiun havas la du kurtaj linioj. Kaj plue ni vidas, ke la aŭtoro serĉas esprimrimedojn: "Akuŝo daŭranta…" certe estas pli gajna esprimo, ĉar ĝi simbolas adan doloron de la patrino pro sorto de ŝia filo. "En ŝi mi naskon prenis…" la linio certe rilatas al la patrino per "Amo super amoj en temp' senfina" kaj kun pliaj du linioj estas ĝeneraliga pritakso de rolo de la patrino en la vivo de ĉiu homo. Verdire la lastaj du linioj de la pli frua versaĵo estas pli taŭgaj por la dua varianto ĉar ĝia etoso pli kongruas al "Infanan amegon prenu – de ereto via". Sed de alia flanko "Infanan amegon akceptu – de l' etulo via" estas iom pli lirika. Kaj ĝenerale ni vidas, ke "Mio mia" eĉ havas plej taŭgan por etoso de la versaĵo formon de soneto kaj, certe, "Egulino mia" estas tro banala nomo por la poemo.

Ni vidas, ke Walerian WLODARCZYK ne estis kontenta pri la versaĵo kaj plu laboris por riĉigi, perfektigi ĝin. La ekzemplo formetas la akuzon de V.Melnikov, tamen restas multaj aliaj.

Estimata poetino Klara Ilutoviĉ montris al ni kapablon de bona poeto rimigi ĉiun tekston. Kaj Ivan Naumov, verŝajne la plej interesa el la nunaj rusiaj poetoj, subtenas ŝin opiniante, ke K.Ilutoviĉ bone rimigis la poemon de Clelia CONTERNO "La atendito". Jes, la ver-

saĵo de K.Ilutoviĉ vere estas brila, sed, mi opinias, ne necesas fieri pri la sukceso, ĉar “Кто-то завоёвывает кубки, а кто-то пишет на них имена победителей” (Lev Ĥobotov). Ĉu vi memoras la tempon, kiam niaj baletistoj pretis baletigi ĉion ajn nur por ricevi ŝtatan aŭ partian laŭdon? Kie nun estas la uzin-fabrikaj baletoj? Io simila estas en la provo de bona poetino K.Ilutoviĉ.

Mi ne estas kontraŭ rimoj, sed mi opinias, ke rimo ne estas sola atingo de poezio. Rimo ne devas esti celo de verkado. Poezio devas esprimi sentojn kaj, se ĝi bezonas rimojn – estas bone; se ne bezonas – tio ne estu krimo.

Plu mi volas prezenti al vi kelkajn laŭ mi interesajn verkojn.

Þorsteinn fra Hamri (Islando)

trad. B.Ragnarsson

Espero

Espero mia kun armil’
en febla man’ ho firmo fluas

sur via buŝ’ aŭguro jen
dum ŝutas fajron tagobril’
laŭ glacivang’ ĉe forstofin’

en monta ombro mi genuas
al vi vendita por ekzil’.

Krepuskas, hurle kuras vent’
sur neĝeben’ kun frostotremoj

kaj vi similas al fabel’
pri silentul’ dum lignifend’
por lasta brul’ de ampoemoj

tra mejloj kaj aŭdeblas bato
dum noktofrido kaj lament’.

Kiu provokas min

kiu provokas min defie
mia glav’ atendas ardigita en la matenruĝo

danco de aĉulinoj
sur la sorĉomonto

homoj komdamnitaj
spronas siajn ĉevalojn
trans la limon de l’ abismo

mia glav’ atendas ardigita en la matenruĝo
kaj bluiĝinta la rando
bluiĝinta unu tranĉorando

Tone Rogelj (Jugoslavio)

Konfeso

Kiam tondra ventego
plej furiozas,
mi iras al la mondpinto
kaj konkuras al Zeŭsaj heroldoj
vetkriante:
"Ĉu ŝi amas min?"

Stultaj fulmoj montras
fajrajn dentojn
kaj ridaĉas,
ĉar ŝi
tiel ege
ege plaĉas
al mi.

Kiam freŝa venteto
plej ĉarme blovas,
mi iras al la mondpinto
kaj al zefiraj spiretoj konkuras
ĝemante elkore:

Ho, se mi povus
blovi anstataŭ vi!
Mi direktiĝus al ŝi
kaj kisus ŝin,
plej mallaŭte,
preskaŭ senvoĉe,
varme dirante
"Mi amas vin!"

Gvozden Sredić (Jugoslavio)

Poste estos egale

Kelkaj min vidas projekcie:
por ili mi estas nur dudimensia.
Por iuj mi tute ne ekzistas:
laŭ ili mi estas nur homhipotezo.
Mi mem ja volus nur kviete vivi,
kaj post la morto estu mi arbaro
aŭ Mikluĥo Maklaj, rusa esploristo.
Ĉar poste ĉio estos ja egale…

La versaĵoj estis presitaj multe pli frue ol mi naskiĝis kaj pro tio, ĉu mi povas nomi ilin "moderna poezio"? Ĉu eblas nomi "modernaj" la versaĵojn de Eroŝenko verkitajn antaŭ la Dua mondmilito? Mi opinias, ke tio estas poezio sen iuj aldonoj.

P.Fiŝo (Moskvo)

KAJ PLU ...

Verŝante nenion de nenie nenien

Ты в плоскости ума подобен таракану,
А в остальном подобен пескарю.
Всё лысиной вертишь и ждёшь, когда я кану,
А может быть, сгорю.

Борис Борисович Гребенщиков, «Критику»

La diskuto pri la rajto je la ekzisto de t.n. "moderna" poezio estas dejardeka, kaj ĝi sufiĉe tedis. Mi ege ne volis enmiksiĝi en la diskuton, daŭrigitan de s-roj P.Fiŝo kaj V.Melnikov (REGo № 2 (4), aprilo 2001), sed, bedaŭrinde, mi ne povas min deteni. Do, ekzistas kelkaj sendubegaj faktoj. Unue: la homa libereco subkomprenas ankaŭ la liberecon de poezia sinesprimo. Due: "de gustibus non est disputandum". Trie: Sovetunio efektive longan tempon ne havis eblon konatiĝi kun la veraj perloj de la moderna poezio de la 20-a jarcento, tial ni estas origine edukitaj per "puŝkinecaj" klasikaj poeziaj formoj, sed tio tute ne signifas, ke la aliaj formoj estas malbonaj. La ĉefa celo de poezio estas transdoni iun ideon, emocion, penson ktp. Rimedoj estas multaj, inter aliaj – rimo kaj ritmo. Sed ili ja estas nur rimedoj, sed neniel la celo mem (estas vere strange, ĉu iu daŭre opinias alie?). La plurfoje menciita Iosif Brodskij neniam neglektis "blankan" verson por esprimi sin, sufiĉas rememori la brilajn "Dediĉe al Jalta" kaj "San-Pietro" (por ne mencii almenaŭ "Boris Godunov" kaj la Malgrandajn Tragediojn de Puŝkin). Sed aliflanke, poeziaĵoj de Velimir Ĥlebnikov, V. Brjusov, A. Blok ofte estas tre malfacile kompreneblaj, malgraŭ senriproĉa ritmo, silabiko kaj rimaro. Do, floru cent floroj, ja kaj Puŝkin, kaj Ĥlebnikov, kaj ĉiuj E-aŭtoroj havas siajn malfortajn kritikeblajn flankojn. Do ni ne kritikaĉu ĉion apriore – tamen esploru ĉiun apartan poemon, sendepende de ties aparteneco al iu ajn skolo.

> Unu el la plej famaj usonaj poetoj de la 20-a jarcento Oden *(Wystan Hugh Auden)* foje diris: "versi sen rimo estas same kiel ludi tenison sen reto". (G.K.)

Al mi ne plaĉas la stilo de V.Melnikov, kiu (tradicie) eligas amason da insultoj, ĉi-foje adresitaj al P.Fiŝo. Jes, P.Fiŝo estas nek Ŝiŝkov nek Belinskij, kaj lia lingvoposedo ne estas la plej perfekta, tamen ankaŭ V.M. mem tute ne estas Puŝkin aŭ Brodskij. V.M. skribas, ke li "preferas kritikon de kompetenta literaturisto al flato de diletanto". Brile: V.M. ne deziras aŭdi opiniojn de simplaj legantoj, ja plimulto ne estas kompetentaj pri la internaj procesoj de poezio. La senco de ĉi ago estas evidenta: nur kompetentuloj rajtas engazete esprimi sian opiniojn (ĉu V.M. verkas siajn aĵojn nur por kompetentuloj?). Ĉio ĉi estas krude kaj maletike.

Revenante al la ĉeftemo. Estas neoponeble, ke kiam poeto havas inspiron por ion verki, tiam la poet' simple verkas – tio signifas, ke nova poemo aperos en tiu formo, en kiu deziras la kreanto – do sendepende de vidpunktoj de P.Fiŝo, V.M., aŭ

Gr. Arosev (Moskvo)

EBLE NE PLU ?

EL MALNOVAJ TEMPOJ

Fosante arkivojn eblas trovi mirindajn aĵojn kaj iom el rezultoj de la fosado mi volas prezenti al la legantoj. Aŭtoro de la versaĵoj estas tute nekonata al mi, sed laŭ prezentataj versoj li estis unu el plej kapablaj poetoj de postmilita Sovetunio. La versoj estis preparitaj por prezento en 1972. Do, ek al la versoj.

Roman Grinŝpan (Taŝkento)

Esperanta gramatiko

Dekses reguloj?
Jes! Por simpluloj.
Por literaturo -
Litera turo.

Imitinda labormetodo

Neniam rapidu!
Komence ekvidu,
Iomete kunsidu,
Poste nur decidu,
Kaj finfine la decidon tre zorgeme tuj ... likvidu

Rererefoje pri la seninvita gasto

Sinbruligo en la pajlo,
Sur la nazo – monta gajlo,
Dum la kis' – ador' de ajlo,
Sur kalkano – tikla fajlo,
Sur la seĝo – akra najlo,
Sur la kapon – brika hajlo,
Lang' premita per tenajlo,
Noktrenkonto kun kanajlo,
Gorĝe – peco da emajlo,
Ĉio ĉi preferindas, ol seninvita, neatendita -
GASTO PARAZITA!

Unu kaj unu

Unu kaj unu – rezultas tri,
Tre multa ĝojo kaj multa kri'.
Ĉu estas prava matematikulo
Pri tia kalkulo,
Pri tia regulo?
Pri tiu eraro'
Pri tiu misfaro
Kulpas juna paro,
La geedza paro
Eĉ ne post unu jaro.

La versaĵojn trovis S.Puz-ov

NOVA TRADUKO

Falĉis Jaĉj' trifolion

(belorusa popola kanto)

trad. Daniil Kolker (Israelo)

Falĉis Jaĉj' trifolion, ///
Kaŝrigardis fraŭlinon.
La fraŭlino ne singardis, ///
Rekte Jaĉjon ŝi rigardis:
"Ĉu vi – Jaĉj', ĉu vi ne? ///
Al mi plaĉas vi tre…"
Li al falĉo finon metis ///
Kaj patrinon li ekpetis:
"Kara mia patrin', ///
Tuj edzigu vi min.
Konatuloj jam geparas, ///
Ĉiunokte amon faras.
Se edzinon mi brakumus, ///
Mi eĉ vinon ne konsumus"…
"Prenu, Jaĉjo, Irenkon – ///
Ŝi okupas tutan benkon".
"Ve, Irenko ne validos ///
Ĉar sur benko ne kunsidos."
"Do vi prenu Paŭlinon, ///
Laboreman junulinon."

POEMOJ EL NOVA LIBRO

Grigorij Arosev (Moskvo)

Daŭbo

Boras menson de sopira sent'
ŝraŭbo.
Nin disŝiris pecen dum moment'
daŭbo.
Premas anguletojn de la kor'
timo.
Estas ĉi sopiro aŭ angor'
krimo.

Mi soifas, mi malsatas sen
nutro,
pendas mia vivo sur faden'
putra.

Ŝajne, mi similas al helik'
luva.
Mi forskuas l'vivon de manik'
pluve.

Peze elefantoj de pensem'
paŝas.
Min leporoj de hororа trem'
kaŝas.
Hundoj de desper', de senesper'
bojas,
kaj ŝakaloj fajraj el infer'
ĝojas.

Ne forglutu min profunda put'
de sort',
eĉ se restis sola nur minut'
ĝis mort',
eĉ se misas, se sinistras tre
vivo,
min ankoraŭ vokas, logas kre'
driva.

Dio, ĉu benotos mia far'
poste?
Ne finiĝas viv' en februar'
frosta.
Februaro feblas febre for:
limo
de imago. Rampas al la kor'
timo.

1999

La tragika historio de tro juna homo

Laŭ ideoj de S. Ĉjornij (Саша Чёрный)

1.
Okazis ĉi tiu afero
dum mia malorda juneco.
Mi havis por noktaj pasioj
knabinon kun fajna animo.
Kaj same dum la trojuneco
por sentoj (kaj nure por sentoj!)
mi konis virinon belkorpan.

2.
Mi vivis en vera perturbo.
Mi provis kompreni, sed vane:
pro kio nenio bonordas?
Ĉu estas maltaŭga vetero?
Ĉu pendas la lun' malfavore?
Ĉu simple mi estas nur dupo?
Ne povis mi tiam kompreni.

3.
Ne povis mi tion kompreni,
sed daŭre mi havis rilatojn
kun l'du. Sed kun ĉiu – aparte.
Neniu el ili konjektis
ke krome mi havas l'alian.
Ĉu mi ilin trompis? Verŝajne.
Sed mi estis mem tre trompita.

4.
La du ŝajnis esti kontentaj.
Sed mi malkontentis terure,
ĉar mi, idioto trojuna,
neniam l'virinojn perfidis:
mi dormis nur kun la unua,
kaj diris pri am' nur al l'dua.
Neniun alian mi havis.

5.
Mi estis stultulo, verdire.
Mi ial ne volis rimarki
en la por-anima virino
la korpon: teneran, allogan.
Kaj en la knabin' por-amora
senperan, kortuŝan animon
mi same ne povis rimarki.

6.
Nun vivas mi vere tutsola.
Forlasis min ambaŭ virinoj,
ĉar ili komprenis finfine,
ke mi ilin longe misuzis.
Sed mi absolute ne kulpas,
min jena kial' repravigas:
tro juna, tro, estis mi tiam…

1995 – 2000

KAJ LASTE

STATISTIKO SCIAS ĈION

Frazo, kiu kronas ĉi tekston estas konata por multaj el vi, karaj legantoj. Kelkaj el vi scias ankaŭ variaĵojn por daŭrigi parolon pri statistiko, kiun oni titolas eĉ pli severe ol "aroga trompo".

Mi volis prezenti en ĉi artikolo kelkajn statistikajn informojn pri opinioj de legantoj pri REGo. Ĝuste por ricevi necesajn informojn, mi demandis la redaktoron pri viaj leteroj, el kiuj eblus ĉerpi informojn pri tio, kion vi volas de la gazeto, kia ĝi devas esti, kio interesas vin. Rezulte mi eksciis, ke tiuj leteroj ne multas en la poŝtkesto de la redakcio. Kio do okazas? Ĉu homoj ne ricevas REGon? Tio ne estas vero – ĉar ĝi estas dissendata al proksimume 300 adresoj. Ĉu ĝi estas neinteresa? – El tiuj leteroj, kiuj venis en la redakcion, eblas konkludi, ke la gazeto estas bezonata, ĝi plaĉas al homoj. Tamen ne grandas kvanto de la homoj, kiuj reagis pri apero de la nova periodaĵo.

Kion do eblas konkludi? Supozeblas ke homoj aŭ ne ŝatas legi esperantistajn ĵurnalojn aŭ ne volas skribi leterojn por laŭdi aŭ kritiki. Ĝis nun neniu resendis REGon kun la vortoj "bv. ne plu sendi la eldonaĵon – ĝi estas malinteresa kaj malaktuala". Iu el legantoj eĉ legis la freŝan kajeron ĝis malfrua nokto anstataŭ dormi. Tial mi konkludas, ke la legantoj simple pigras reagi al la artikoloj, intervjuoj, skizoj ktp. Tiukaze eldoni gazeton similus ludi piedpilkon unuope, kiam neniu kunludas, kaj neniu staras en la golejo, kaj forestas atestantoj-spektantoj.

Tio ne estas celo de la gazeto. Ĝi devas servi al ĉiuj espoj de nia lando kaj prezenti ĉiujn interesojn kaj temojn. Ĝuste tial mi petas vin respondi ĉisubajn demandojn kaj sendi la respondojn al la redakcia adreso. Se vi mesaĝos rete, notu la temon "STATISTIKO".

1. Kiuj artikoloj plaĉis al vi en REGo (3-5 titoloj)? Kial?
2. Kiuj artikoloj estis malinteresaj, enuaj, neaktualaj? Kial tio okazis laŭ via opinio?
3. Kion vi ŝatus vidi kaj legi en la gazeto? Kiuj temoj kaj problemoj interesas vin?
4. Via ĝenerala opinio pri REGo: kia ĝi devus esti? Kion indas ŝanĝi?
5. Ĉu vi povus verki ion por la gazeto?

Por fari REGon interesa kaj bezonata necesas kune labori. Jam nun estas propono fari paĝon pri Interreto kaj Esperanto kongrue al modernaj postuloj. La redakcio serĉas homon, kiu zorgos pri ĝi. Se vi estas interesita pri tiu kunlaboro – kontaktu.

Atendante viajn leterojn

Andrej ALASKIN (Moskvo)

Estis dum la Tago de Sankta Valenteno kiam virino vekiĝis kaj ekscite anoncis al sia edzo: "Mi ĵus sonĝis pri vi, donanta al mi perlan kolĉenon! Kion signifas tiu sonĝo, laŭ vi?"
Per certega firma voĉo la edzo respondis: "Ĉi-vespere vi scios tion!"
Tiun vesperon la revenanta edzo donis malgrandan pakaĵon al sia edzino."Por vi, mia kara", li diris.
Kun iomete tremantaj manoj la edzino malvolvis la pakaĵon kaj rigardis: libron titolitan "La Signifoj de Sonĝoj". *(esperanto-anekdot)*

Estimataj legantoj! La abonkosto de REGo en tiu ĉi jaro estas malpli granda ol la produkto– kaj sendokostoj, estis antaŭvidite, ke dum la unua jaro la gazeto estos subvenciata. Por ke ankaŭ en sekva jaro la abonkosto ne iĝu tro granda estas organizita la fondaĵo "REGo – malmultekosta abono". La monon por tiu ĉi fondaĵo eblas sendi aŭ transdoni al Garik Kokolija. La unuajn kontribuojn faris jam Valerija Cvetkova (Sankt-Peterburgo) kaj Klara Ilutoviĉ (Elektrostal). Grandan dankon al ili!



RUBAJOJ☆

dediĉitaj al miaj persikaj☆☆ amikoj-esperantistoj

Al Vova' Samodi'

Vinon trinkis mi longe el bela kalik'
Ĝis aperis en ĝi granda fendo kaj lik'.
Mi kalikon ŝatatan decidis forĵeti –
Senutilas kaliko kun lik' por aplik'!

Al Valik' Melnik-ĥan

Belulino ĝojigis min pro la konsent',
Sed forflugis ŝi tuj kiel blovo de vent'.
Jen denove mi solas sen ajna konsolo –
Restas tial por mi nur pieco kaj pent'…

Al Vik Aroli'

De Bulonjo mi legas la Deklaracion,
Kaj mi trovas en ĝi nure puran racion.
Kvankam punktoj en ĝi estas kvin, sed ne deko –
Donas klaran pri ĉio al ni ĝi nocion!

Al Iskander Korĝejni'

Raŭma estas konata al mi Manifest',
Maniuloj per ĝi strebas al sia fest'.
Ne por longa ekzisto ĝi estas verkita –
Fina venko alvenos, kaj prenos ĝin pest'!

Al Slavig' Ivani'

"Esperanton ekkonu ĉiu gent' kaj popol'!"
La slogano ja estas de Pandora skatol' –
Ju pli multaj parolos en la verda lingvo,
Des malplios la rol' de alia parol'!

Palinur Duraki',
persika poeto

☆ *En PIV por certa versokvaro ekzistas la termino "robajo", sed mi opinias, ke al miaj provoj pli konvenas "rubajo", ĉar oni, se necesas, povas aldoni ĉapelon al "j" kaj ĝoji.*

☆☆ *Persiko – scienca branĉo, traktanta ĉion persan.*



INTERESAJ TROVAĴOJ

G.Arosev trovis en komputila ludo “Erudit” jenan demandon kun variantoj de la respondo:

0:08

ИГРАЕМ!

ХОД	СУММА
15	1 000 000
14	500 000
13	250 000
12	125 000
11	64 000
10	32 000
9	16 000
8	8 000
7	4 000
6	2 000
5	1 000
4	500
3	300
2	200
1	100

"Мир - это единый край, человечество - единый народ". Этот девиз принадлежит

Эсперантистам

Футболистам

Гомосексуалистам

Коммунистам

ЗВОНОК В МЧС

50/50

ПОМОЩЬ ЗРИТЕЛЕЙ

СТОП! БЕРУ ДЕНЬГИ

ЗВУК НАДОЕЛ

ПРАВИЛА ИГРЫ

ПРЕДВАР. КОНКУРС

ОСНОВНАЯ ИГРА

СКОРОСТЬ ИГРЫ

ПОМОЩЬ "50/50"

ПОМОЩЬ "ЗРИТЕЛЕЙ"

"ЗВОНОК В МЧС"

НАЧАЛО

ОБ ЭТОЙ ПРОГРАММЕ

ОБ АВТОРЕ

G.Kokolija trovis jenan rememoron en la membiografio de Bertran Rassel (Russell) (“Inostrannaja literatura” 12/2000):

“Помню также, как меня обрадовало восторженное письмо по поводу моей книги от Луи Кутюра, с которым я в ту пору не был знаком, но чью работу “Математическая бесконечность” рецензировал. <...> Вскоре я поехал в Канн, где он профессорствовал. Он не ожидал, что я так молод, но это не помешало нам сблизиться и дружить до самой его смерти, последовавшей в 1914 году: он погиб под колёсами грузовика во время всеобщей мобилизации. В последние годы его жизни мы почти не виделись, потому что он с головой ушёл в разработку международного языка идо, которому отдавал предпочтение перед эсперанто. Он рассказывал, что за всю человеческую историю никто не подвергался таким гонениям, как эсперантисты, но от слова “эсперанто” хотя бы можно образовать производное – “эсперантист”, а от “идо”, сокрушался он, даже имени носителя нельзя образовать. Я тут же нашёлся, предложив “идиот”, но почему-то это ему не очень понравилось.”

REGo (Rusia Esperanto-Gazeto) ***№ 3 (5) junio 2001***

komuna eldono de REU kaj REJM

redaktas Garik Kokolija *retpoŝto* <gazeto@mail.ru>

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45-105, 123310 Moskvo, Rusio

por tiu ĉi numero kunlaboris: Viktor Aroloviĉ, Grigorij Arosev, Oleg Kuznecov

la gazeto estas presita en la tipografio “Policvet” (u.Klin)

abontarifoj por 2001:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 60 rubloj sendendaj al

Георгий Владимирович Score Коколия, Пятницкое шоссе 45 – 105, 123310 Москва

por loĝantoj de aliaj landoj – 10 eŭroj pagendaj al la konto **kklg-r** *ĉe UEA*